

Esperanto V-1947/56 (1987)

BULGARA ESPERANTISTO


ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA JUBILEA
JARO
•
SOLENA
CELEBRADO
•
NIAJ
VETERANOJ
•
JUNA
ESPERANTISTO
•
JUBILEA
DOKUMENTA
FILMO
•
UNIKA
LIBRO
•
REPLIKO
•
POEZIO



JARO 56 • N-RO 1 • JANUARO • 87



Soci-politika aspekto de bulgara esperanto-movado (1887–1917)

La Esperanto-movado en Bulgario aperis samtempe kun tiu en Rusio. Post eldono de la Unua Libro por rusoj (en julio 1887), tiu estis distribuita de D-ro L. L. Zamenhof tra la tuta mondo por informo al gazetaro, al kulturaj organizoj, al diversaj instancoj pri klerigo kaj scienco, al elstaraj personoj (verkistoj, ĵurnalistoj, filologoj, filozofoj, politikistoj), al volapukistoj k.a.

Ekzempleron de tiu unua eldono de ruslingva E-lernolibro ricevis Miloslav St. Bogdanov (Diodono), 19-jaraĝa, komencanta redaktoro de ĵurnalo „Balgarski novini“ („Bulgaraĵoj“) en Sofio. Bogdanov (1868–1914) estas la unua esperantisto en Bulgario. Li ellernis Esperanton, tradukis la lernolibron en bulgaran lingvon kaj iom kompletigis ĝin per legaĵoj el poezio kaj prozo, per informoj el Bulgario k.a. Tiu starta preparlaboro estis tre grava. La bulgara E-lernolibro aperis en du eldonoj (1889–1890 kaj 1890). Ĝi estis aĉetebla en daŭro de kvin jaroj (ĝis 1895).

La soci-politika aspekto de la E-movado estas la plej grava konsistajo de la ĝenerala historio pri tiu movado. Sen tiu komponanto la ĝenerala historio de la E-movado estus malperfekta, grave malsana, profunde kripla kaj sekve malforte efika. Dum la traktata 30-jara periodo (1887–1917) la bulgara E-movado spertis plurajn dekojn da politikaj eventoj, organizitaj de multaj bulgaraj aktivuloj kaj estraranoj de la landaj E-movado kaj E-organizo en Bulgario. Tiuj eventoj efikis pri atentigo, edukado kaj vigligo de sescento da bulgaraj esperantistoj dum tiu periodo kaj ili ne perdis sian moralan forton eĉ nun.

Surbaze de faktoj mi havas eblecon skizi kelkajn karakterizajn trajtojn pri la mondkoncepto de la unuaj bulgaraj esperantistoj, rivelante la kulminojn en la aspekto de progresema fluo inter la bulgara esperantistaro de la unua kaj dua generacioj:

1. La bulgara esperantista movado startis kiel respublikista kaj kontraŭmonarkia. Pro tia agado Bogdanov estis eksigita el la jura fakultato de la Universitato en Sofio (1895). Post deko da jaroj (1907) eksigita estis ankaŭ Hristo Totev Rjaĥovski (1881–1933). Ili finis sian universitatan studadon pri juro en eksterlando kaj reveninte

en sian patrolandon ili fariĝis advokatoj.

Bogdanov konsilis al la monarkoj (caroj, imperiestroj), ke ĉiu el ili abdikus sian tronon, laŭ propra iniciato, sekvan la ekzemplon de la brazila imperiestro Don Pedro, por eviti sangnan renverson per armita popolribelo.

2. Pledon por defendi la interesojn de la laborista klaso faris:

a) Bogdanov, kiu avertis, ke oni ne devas ekskludi la eblecon, ke iam en la estonteco la homaro povus ekiri laŭ la vojo al komunismo;

Bogdanov estis elektita (en decembro 1900) por redakti la organon de „Vickuracista Societo“ en Sofio (kun filioj en la provinco);

Bogdanov fondis kaj redaktis (1901) la gazeton „Vickuracisto“;

b) Nikola Dimitrov Kovaĉev (1867–1924), eksa kompostisto (oficisto en juĝejo, samtempe redaktoro, en 1903 estis maldungita de sia malalta ŝtatoŝefo kaj persekutata). Li defendis la laboristajn postulojn dum strikoj (1895) en Sofio. Kvankam kun etburga mondkoncepto (Kovaĉev mem ne kaŝis tion), li lasis al ni findindan priskribon pri la plorinda stato de la ekspluatata laborista klaso fine de la XIX jarcento.

c) Stefan Minkov (1883–1982) membris kelkajn jarojn en la franca laborista-sindikata movado kaj pro modela agado tie post sia reveno en Bulgarijon li fariĝis membro de Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio (Revoluciaj Socialistoj) en 1914 kaj dum du jaroj (1914–1915) estis sekretario de la Bulgara Esperantista Societo (BES), t.e. la tiutempa landa organizo de la bulgara esperantistaro.

3. Defendo de Esperanto kaj de socialismo. En 1894 sciencistoj kaj universitataj profesoroj multflanke atakis Esperanton. Docento D. Matov, universitata filologo, kune kun Esperanto atakis ankaŭ la socialismon. Defendante Esperanton, Kovaĉev kaj Bogdanov defendis ankaŭ la socialismon. En 1895 iuj el la kritikantoj reviziis fragmentojn de siaj antaŭaj tezoj.

4. Kovaĉev, kiel redaktoro kaj ĵurnalisti, tre bone konis la internajn soci-politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn aferojn de Bulgario. Li observis ankaŭ la politikon de la

opozicia Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio (BLSDP), kies eldonojn li ricevis interŝanĝe. Kovaĉev, eksa kompostisto, estis kortuŝita pro la zorgoj de BLSDP pri la laboristaro kaj pri la strikantaj laboristoj speciale. En iu tia momento de kortuŝo Kovaĉev eldiris brilan prognozon pri hela estonteco kaj de la proleta partio kaj de la laborista klaso:

a) „La situacio de nialandaj laboruloj de tago al tago fariĝas ankoraŭ pli malbona, la laboristo en nia lando suferas pro mankoj kaj malagrablaĵoj, lia laborforto estas ekspluatata fare de la mastroj — ĉio ĉi okazas ĉiutage, antaŭ niaj propraj okuloj. Dum la kuran-
ta jaro eĉ komencis okazadi ĉiutage laboristaj strikoj, kvankam ili estas ne bone organizitaj. Dum la kuran-
ta monato ree okazis striko en Sofio. Per unu vorto la situacio de la laboristaro en nia lando estas tre malesperiga.“

b) „Niaj ĝisnunaj registaroj tro klopodis por pli bone rekompenci kaj sekurigi la situacion de burokrataro, sed pri la bedaŭrinda laborista amaso ili eĉ ne deziris pensi. Nuntempe la situacion de la laboristaro oni povus kompari kun maŝino: kiam la lasta difektiĝas, la mastro venigas specialiston por ripari ĝin, tamen se laboristo malsaniĝas, li fariĝas kiel nebezona ĉifono — oni lin maldungas kaj substituas al alia.“

c) „Ĉe tiom malbona situacio, en kiu troviĝas la laboristoj en nia lando, kreiga favoraj cirkonstancoj por konstituo ankaŭ de socialisma partio, kiu prenis sub sia protekto la laboristaron kaj zorgas pri plibonigo de ties sorto. Rezulte de tio nun la socialismo faras gravajn saltojn antaŭen kaj ne estas malproksima la epoko, kiam tiu ĉi juna miniatura partio fariĝos la plej forta, la plej granda kaj dinamika partio, celanta reorganizi la tutan ŝtaton.“

La postuloj de niaj socialistoj ŝajnas al ni utopiaj, sed se ni trafolumos la historion, ni konstatos, ke en sia komencigo ĉiuj plej grandaj atingiĝoj de la homaro ŝajnis nerealigeblaj!“

Feliĉe tiu prognozo de N.D.

(Sekvas sur paĝo 4)



LA JUBILEA JARO

Aristo GOROV,
prezidanto de BEA

Por ni esperantistoj la jaro 1887 estas memorinda per la apero de Esperanto. Pri tiu evento L.L.Zamenhof skribis:

„En 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino Klara Zilbernik mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado, kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne tute konsentis, sed ŝi donis al mia dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon eldoni en julio 1887 lernolibron de Esperanto en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca.“

Kiam aperis la Unua Libro de Esperanto, Zamenhof estis nur 28-jaraĝa. Por propagandi la novan lingvon, li donis anoncojn en gazetoj, dissendis senpage grandan nombron da libroj. Kaj li senpacience atendis opiniojn. Kiel oni akceptos lian verkon, al kiu li dediĉis dek jarojn de sia vivo? Ĉu lia kreaĵo povos konkuri kun Volapuko, kiu artefarita lingvo havis adeptojn en tridek lokoj, disponis pri mil diplomitaj instruistoj kaj en kiu aperas dudek kvin gazetoj? En tia animstato li versis:

Ho, mia kor' ne batu maltrankvile,
el mia brusto nun ne saltu for!

Ho, mia kor'! Post longa laborado,
ĉu mi ne venkos en decida hor'?

La rivaloj de Esperanto — Volapuko kaj Latino sen fleksiĝo, komencis malpopulariĝi kaj estis kondamnitaj al morto. Kial? Kontraŭe al Schleyer, kiu provizis sian Volapukon per kompleta gramatiko kaj dika vortaro, Zamenhof alpaŝis genie al realigado de sia lingva projekto — li liveris unue nur minimumon, dek ses regulojn gramatikajn kaj 917-radikan vortareton, lasante ĉion alian al libera iom-post-ioma ellaborado. Tio certigis al Esperanto senriskan evolupovon kaj uzon de novaj vortoj laŭbezono. La riĉigo de la vortaro dum cent jaroj okazis sub kontrolo de la Akademio de Es-

peranto, kies tasko estas: „zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon“. Jen kiel riĉigis la vortrezoro de Esperanto — la vortaro de la konata soveta lingvisto profesoro E. Bokarev, eldonjaro 1982, enhavas preskaŭ 26.000 vortojn.

Ekde la apero de Esperanto en diversaj landoj ĝi havis rivalojn: Idiom-neŭtral (1898), Ido, Okcidental (1922), k.a., sed ili ĉiuj fiaskis pro manko de adeptoj kaj pro ilia sentaŭgeco kiel lingvo internacia.

Esperanto vivas kaj evoluas, adaptiĝante al la bezonoj de la homa civilizacio. Nuntempe en UEA membras 45 landaj Esperanto-unuigoj kaj dekoj da fakaj asocioj, aperas pli ol cent revuoj. Ĉiujare pliriĉiĝas la originala kaj traduka literaturo. Nun Esperanto similas al centjara majesta kverko kun radikoj en la kvin kontinentoj. La Generala Konferenco de UNESKO, okazinta en Sofio (8.10.—12.11.1985), unuanime akceptis rezolucion, kiu rekonas la jubileon de la internacia lingvo Esperanto.

Dank' al la rusa lingvo Esperanto penetris en nian landon baldaŭ post ĝia apero. La unua lernolibro por bulgaroj datiĝas de la jaro 1889. Ĝia aŭtoro estas la juristo kaj ĵurnalisto Miloslav Bogdanov. Li redaktis la gazetojn „Mondlingvisto“ kaj „La Espero“. Unuopaj bulgaraj volapukistoj ankau fariĝis adeptoj de Esperanto.

En la jubilea jaro sonos pli forte ol iam ajn „La Espero“ — „En la mondon venis nova sento...“ La nova sento pri paco kaj amikeco interpopola trovas ĉiam pli kaj pli da novaj adeptoj, igas ilin ŝangi sian pensmanieron, ĉar en la epoko de la raketoj kaj atombomboj estas neniam alia alternativo: aŭ paca kuneckizistado, aŭ pereol

Dum la jubilea jaro sonos pli forte la kredo de Zamenhof:

„Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
obstine ĝi paŝas provita, hardita,
al cel' unu fojon signita!“

SOLENA CELEBRADO

La genia verko de d-ro Zamenhof, aperinta en 1887, en mallonga tempo disvastiĝas kaj gajnas multajn adeptojn. Bulgario estas inter la unuaj landoj, en kiujn ĝi penetras.

Fondinto de la E-movado en urbo Ĉepelare estas Stojan Marev, kiu fordonis 50 jarojn de sia vivo al Esperanto, al disvastigo de ĝiaj ideoj kaj literaturo en nia urbo. Li havas meritan lokon en la vicoj de la unuaj bulgaraj esperantistoj. Jam en 1936, unu jaron antaŭ la fondo de BEA, Stojan Marev korespondis kun esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Aŭstrio, Belgio kaj aliaj landoj. Naskita en Plovdiv (24.1.1885), dum 1905—1907 li militservas en Orjahoŭo ĉe Danubo kaj, supozeble, tiel eklernas Esperanton. De 1911 ĝis 1921 li estas konstanta reprezentanto de la plovdivaj esperantistoj en UEA (Genevo), kaj de 1921 li reprezentas la esperantistojn el Ĉepelare. Tio videblas el la konservitaj jarlibroj-adresaroj. En tiu jaro Stojan Marev transloĝiĝas en Ĉepelare, ĉe sia edzino, kaj eklaboras por popularigo de Esperanto. La unuaj varbitaj de li esperantistoj (en 1926) estas la bankoficisto Janko Andonov, la oficistoj Kostadin Ŝarkov kaj Janko Kirjakov, la kuracisto d-ro Nudelman, la gazetvendisto Boris Dimitrov k. a.

La tiamaj regantoj ne aprobis Esperanton, tial la provizadon per lernolibroj kaj E-literaturo kaj la ĉiuspekajn aktivecojn S. Marev organizas sekrete en sia librovendejo. Dank' al lia obstina propaganda laboro en la jaroj 1927—1930 multaj junaj homoj komencas lerni Esperanton. Inter ili estas ankaŭ la bulgara nacia heroo, la esperantisto kolonelo Diĉo Petrov, pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo. En 1932, kiel lernanto, li ricevis sian

unuan lernolibron de Esperanto en la librovendejo de baj Stojan Marev. Nun nia E-societo en Ĉepelare portas lian nomon.

En 1932, pere de siaj korespondantoj en Nederlando, Stojan Marev liveras en Ĉepelare la unuan radioricevilon „Philips“, kaj la lokaj esperantistoj ofte kolektiĝas por aŭskulti esperantajn emisiojn de diversaj alilandaj radiostacioj. Tiutempe lia librovendejo fakte estis ilia neoficiala klubejo.

La evoluo de la E-movado en Ĉepelare, kvankam duonleĝe, daŭras ankaŭ dum la jaroj ĝis la komenco de la Dua Mondmilito en 1939.

La pliparto de korespondantoj kaj libroj de Stojan Marev perdiĝis, sed multaj estas konservitaj — leteroj de liaj korespondantoj en 1906, valoraj libroj — originalaj verkoj kaj tradukoj de la krelinto de Esperanto L.L. Zamenhof, de d-ro Kabe, de Ivan Krestanov kaj Atanas D. Atanasov (ADA), Esperantaj lernolibroj, vortaroj, apartaj ekzempleroj de revuoj.

Kiel ĉiuloke en nia lando, tiel ankaŭ en Ĉepelare, post 1944, en libera Rodopi-montaro, la evoluo de la E-movado rapide ekprogresas.

En 1966 la filo de Stojan Marev — Dimitar Marev, restarigas la esperantistan agadon en la urbo. En la unua fonda kunveno li estas elektita prezidanto de la societo. Per tio oni metas la komencon de nova, organizita periodo de la E-movado en Ĉepelare. Dum tiuj jaroj en nia societo aktive laboras Andon Kirov (kasisto), Erma Taleva (sekretario), Ekaterina Stajkova — sperta E-instruistino, Nikolina Takova — E-instruistino, kiu multe kontribuis por preparo de niaj grupoj por partopreno en naciaj revuoj kaj internaciaj festivaloj en Vraca kaj Bansk. En la sporta lernejo, kie D.

Marev estis instruisto, estis kreita la mandolina ensemblo „Juna Stelo“.

En 1982 la esperantistoj en Ĉepelare solene celebris la 75-jariĝon de BEA. Sur la domo de Stojan Marev estis metita memorplato pri la komenciĝo de la E-movado en Ĉepelare.

La esperantista kino-klubo „Evridika“ — Smoljan, faris mallongan dokumentan filmon pri la historio de Esperanto en Ĉepelare.

Nia societo havas viglan internacian aktivadon. Ni organizis ekspoziciojn en Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio. Niaj delegitoj partoprenis la kongresojn de UEA en Varno kaj Budapeŝto. Multaj el niaj esperantistoj havas korespondantojn en alilando. En 1985 nia societo starigis kontaktojn kun la hungara E-klubo „Julio Baghy“ kun kiu ni havas kontakton pri reciproka gastado. Al ni gastis esperantistoj el Drezdno, Lejpcigo, Ŝverino, k. a. kiuj same pretas kunlabori pli aktive.

La ĝisnunan fruktodonan agadon de nia societo ni grandparte ŝuldas al la sperta gvidado kaj sindonemo de nia multjara prezidanto Dimitar Marev, kiu estis elektita membro de CE de BEA de ĝia 40-a Kongreso. Bedaŭrinde, pro malsaniĝo, komence de la kuranta jaro nia ŝatata prezidanto devis forlasi sian poston — el liaj manoj la stafeton prenis la juna kaj esperiga Petar Panov.

La 60-jariĝon de nia E-societo en Ĉepelare ni notas en la jaro 1986 — proklamita de UN kiel jaro de la paco. Kaj ni esperas, ke ne estas senutila ankaŭ nia modesta kontribuo al la komuna laboro de la tutmonda esperantistaro por mondo sen milito, por paca kaj feliĉa vivo.

Ekaterina STAJKOVA

FERVOJISTA SOCIETO „ESPERO“ — 20-JARA

La esperantista societo „Espero“ — Plovdiv, estas fondita en 1966 de 14 entuziasmuloj-fervojistoj, inter kiuj estis Georgi Gerasimov, Georgi Atanasov, Ivan Stojcev, Lazar Karakaŝev, Bono Bonev k. a. Dum tiu 20-jara periodo ĉiujare la societanoj organizis kursojn de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj. Multaj membroj de „Espero“ korespondas kun esperantistoj el aliaj landoj. La plej pasiaj korespondantoj estas: Lazar Karakaŝev, Elena Mateeva, Dimitar Burdev, Tonĉo Lozev, Maria Kiĉukova, Reni Georgieva k. a.

Membroj de societo „Espero“ par-

toprenis en preskaŭ ĉiuj kongresoj de IFEF. Sian kontribuon por la sukcesa okazigo de la 36-a IFEF-kongreso en Slanĉev Brjag, kiel membroj de la Kongresa Komitato, donis Elena Mateeva, Reni Georgieva, Lazar Karakaŝev, Dimitar Burdev, Tonĉo Lozev kaj Radko Ikonov.

Solenaĵo lige kun la 20-jara jubileo de la societo okazis la 20-an kaj 21-an de septembro 1986 en IEK-Pisanica. Ĝin partoprenis reprezentantoj de ĉiuj esperantistaj fervojistaj societoj en la lando. Gastis Horst Teurih (GDR), Ferenc Kapšandi (Hungario), Dušan Mitković (Jugoslavo), Georgi Litov — reprezentanto de la Fervojista Sek-

cio ĉe BEA, Danĉo Danĉev el DE de BEA en Plovdiv kaj Veselina Kurteva, prezidantino de societo „Kulturo“, Plovdiv.

En la solena kunveno la prezidanto de „Espero“ Lazar Karakaŝev traĝis raporton pri la vivo kaj aktivado de la societo dum la 20-jara periodo. Kelkaj personoj — meritaj veteranoj kaj aktivuloj de la societo, estis distingitaj per objekta premioj.

En la nomo de la kunveno estis senditaj telegramoj al la estraroj de IFEF (Bruselo) kaj al BEA — Sofio.

Lazar KARAKAŜEV

Soci-politika aspekto de bulgara esperanto-movado (1887–1917)

(Daŭrigo de paĝo II)

Kovačev (K. Mores) efektiviĝis komplete en nuna socialisma Bulgario.

5. Penko Petrov (1880–1978) el urbo Jambol, esperantisto de 1899, revolucia social-demokrato, sendis leteron (1904) al D-ro L. L. Zamenhof pri Esperanto kaj pri la internacia agado de politike organizitaj laboristoj en la II Internacio. D-ro Zamenhof „respondis“ (1905) publike per strofo en „Preĝo sub la Verda Standardo“:

„Ni inter popoloj la murojn detruos kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos kaj falos por ĉiam kaj amo kaj vero ekregos sur tero.“

6. Kovačev estas la unua, kiu malkovris kaj publike aprezis la ĵurnalsman talenton de Josif Jakov Herbst (1875–1925) jam en 1901. Herbst estis murdita de la bulgaraj faŝistoj en aprilo 1925, kune kun li pereis multaj aliaj progresemaj intelektuloj de Bulgario.

7. Bogdanov pledis por kunlaboro inter la etburgaj partioj (agrarana, radikala k. a.) kaj la Bulgara

Laborista Social-Demokrata Partio dum la balotoj en 1903 por povi elimini la egburgajn partiojn el la regado super la popolo. En la ekstera politiko li propagandis favore al Federacio de la Balkanaj Landoj.

8. Post sia reveno el eksterlando Ĥristo Totev Rjaĥovski iniciatis kaj fondis lokan organizon de Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio (Revoluciaj Socialistoj) en urbo Levski.

9. Festo pri Botev-poezio en Francio. Iom antaŭ la komenciĝo (1914) de la Unua Mondmilito, laŭ iniciato de Ivan Ĥaralampiev Krestanov (1890–1966), la bulgaraj studentoj en Francio organizis feston dediĉitan al la poezio de Ĥristo Botev, bulgara poeto-revoluciulo. Okaze de la festo studentoj faris la unuajn tradukojn de Botev-verkoj en francan lingvon. Parto de tiuj tradukoj aperis en la franca gazetaro.

10. En la periodo 1899–1917 aktivis trideko da laboristaj esperantistoj tra la tuta lando. Oni malfermis specialajn E-kursojn por laboristoj kaj eĉ estis fonditaj la unuaj

laboristaj Esperanto-societoj en urboj Jambol (1910) kaj Sofio (1911). En la periodo 1907–1914 deko da bulgaraj laboristaj esperantistoj kunlaboris en „Internacia Socia Revuo“, kies unua peranto por Bulgario estis Bogdanov. Inter la kunlaborintoj mi menciuj Ĥristo Rjaĥovski, (M. Ĝerĝikov, Penko Petrov, Ivan Krestanov, Panajot Kolev, Ivan Nenov, k. a.

Tre aktive agadis en tiu periodo Krestjo Janev Sivriev (1880–1959), Vasil Tabakov (1879–1963), Dragoj Koĝejkov k. a.

11. Bulgaraj esperantistoj—militkaptitoj en Rusio dum la Unua Mondmilito, aliĝis kunlabore al la bolŝevistoj kaj partoprenis la Grandan Oktobran Socialisman Revolucion (1917): Georgi Miĥajlov Dobrev, Petro Velev Toŝkov (1878) — 1957), Petro Taŝkov (1895).

12. Resume de tio aperis propra tradicio pri memorado kaj konsciado de la pasintaj eventoj por lerni saĝon el akumulita sperto:

a) Kovačev verkis Historion de la bulgara E-movado, kiun Krestanov du fojojn kompletigis kaj eldonis (1910, 1919).

b) Somere de 1907 en Sofio estis organizita speciala landa celebrado okaze de la 20-jara datreveno ekde apero de Esperanto kaj ties movado kaj literaturo (1887–1907).

c) En majo 1911 la esperantistoj en Veliko Tarnovo organizis celebradon de sia E-societo „Lumo“, okaze de la 15-jara datreveno ekde ties fondo (1896–1911).

ĉ) En la kursoj por progresintoj oni komencis lerni historion de la Esperantaj movado kaj belliteraturo (beletro).

Canko MURGIN

PLENKUNSIDO PRI PROPAGANDO DE ESPERANTO

La 13-an de novembro j. k. DE de BEA en Pleven okazigis specialan plenkunsidon celantan plibonigon de la laboro por priesperanta informado de la societoj en la distrikto.

Gastoj de la plenkunsido estis: Kalinka Vasileva, reprezentantino de CE de BEA, Maria Zaneva el la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto kaj Stela Ilieva — el DK de la Pacdefenda Komitato — Pleven. La plenkunsidon gvidis Vâlka Dobрева, prezidantino de la Distrikta Estraro de BEA.

Pri temo „Por pli celdirektita kaj efektiva propagando de Esperanto“ prelegis Donĉo Ĥitrov, membro de la Buroo de CE de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Li skizis en historia aspekto la ĝisnunan sperton en la informado pri Esperanto (mondscale kaj enlande), montris iujn gravajn malperfektaĵojn tiurilate, la penojn de UEA kaj de la Informaj Fakoĵ ĉe la landaj E-asocioj bone organizi kaj plivigligi la informlaboron pri Esperanto. Li menciis pri la okazinta en 1956 speciala kunveno de landaj informfakoj en Frostavallen (Svedio) kaj pri la akceptita dum tiu kunveno „Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo“, kies rekomendoj validas ankaŭ hodiaŭ kaj plu estas gvidprincipoj en nia informlaboro.

La preleginto tuŝis ankaŭ aliajn gravajn proble-

mojn — pri prepariteco de la informantoj, pri la nivelo de ilia lingvoposedo kaj ĝenerala kulturo; pri ilia kapablo labori kun varia laŭ aĝo kaj interesoj aŭditorio; li atentigis pri ofta troigo de la „facileco“ de Esperanto-lernado kaj de la rolo de Esperanto por solvo de la plej akraj mondproblemoj. D. Ĥitrov montris multajn ekzemplojn de sukcesa, trafa informado pri Esperanto en diversaj socitavoloj kaj dank' al regula kunlaborado al la amaskomunikiloj — gazetoj, radio, televido. Li substrekis la bezonon pri altnivela arta preparo de niaj bildaj kaj tekstaj materialoj kaj rekomendis, ke oni aranĝu en centraj lokoj montrofenestrojn kaj standojn kun interesaj materialoj pri Esperanto, kiuj ĉiam altiras la atenton de neesperantista publiko.

La prelegon de D. Ĥitrov sekvis vigla diskutado. Multaj el la partoprenantoj rakontis pri sia sperto en la informado pri Esperanto, faris praktikajn proponojn. La riĉa je interesaj iniciatoj Rezolucio, proponita de Vâlka Dobрева, estis unuanime aprobita. La propono pri okazigo en Pleven de nacia literatura konkurso-recitalo el verkoj de la poeto-esperantisto Cvetan Spasov kaj pri la rusa-bulgara batalamikeco estis entuziasme akceptita.

Radi BANĈEVSKI

SENCOPLENA VIVO

Hristo Kolev-Bojkata estas unu el la plej aktivaj bulgaraj esperantistoj en la 20-aj jaroj de nia jarcento —unu el la iniciatintoj por restarigi de esperantista societo „Karl Liebknecht“ en Gabrovo en 1919 kaj ĝia prezidanto.

En „Sennacieca revuo“ de la 1-a de oktobro 1922 oni povas trovi mallongan anoncon pri korespondado: „Hristo Kolev el Gabrovo, 26-jara, fervojisto, deziras korespondi.“ De tiuj linioj oni povas kompreni, ke li estas naskita en 1896, t. e. antaŭ 90 jaroj. Lian nomon oni trovas ankaŭ en la rememoroj de Ivan Kosev el v. Găbene, konservataj en la Partia Arĥivo en Gabrovo. En ili la aŭtoro skribas, ke Hristo Kolev-Bojkata estas naskita en la balkanmontara vilaĝeto Smilovci, apud v. Găbene.

Kion ankoraŭ ni scias pri tiu sindona esperantisto? Li laboris en Germanio, en urbo Dresdeno, kaj tie konatiĝis kun la gvidantoj de la germanaj laboristoj Rosa Luksemburg kaj Karl Liebknecht. Pli malfrue, reveninte Bulgarion, laŭ ilia konsilo Hristo Kolev organizas grupon en sia vilaĝo, en kiu membriis 6 personoj el v. Găbene kaj el la najbaraj vilaĝetoj.

Laŭ rememoroj de Mara Vasileva Tabakova-Konova, kiam en 1923 Hristo Kolev estas arestita kiel komunista ŝia partio Vasil Tabakov provas influi pri lia liberigo kaj sukcesas.

Post la Septembra Ribelo en 1923 Hristo Kolev daŭrigas labori fervore por la laborista movado kaj por Esperanto. Lia estas la ideo, ke la internacia helplingvo Esperanto estu akceptita de la homoj, kiuj membras en Bulgara Fervojista Asocio, kaj ke ili uzu ĝin. En la esperantista gazeto „Zelena Zvezda“ („Verda Stelo“) n-ro 26, p. 3 de 9-a de marto 1925) eliranta bulgarlingve en urbo Pleven unufoje en la semajno sub rubriko „Esperanta kroniko. En nia lando“ estas anonco kaj rezolucio: „Fervojistoj kaj Esperanto. La 8-an de februaro 1925 samideano Hristo Kolev el Gabrovo legis antaŭ la Generala Konsilio de Bulgara Fervojista Ligo referaĵon pri temo „La helplingvo Esperanto“, kiu estis aŭskultita de la ĉeestantoj kun granda atento kaj estis renkontita kun unuanima aprobo. Unuanime estis akceptita ankaŭ la proponita de la raportanto

REZOLUCIO PRI ESPERANTO

Hodiaŭ, la 8-an de februaro 1925 la Dua Ĝenerala Konsilio de Bulgara Fervojista Asocio, aŭskultinte la referaĵon de kamarado Hristo Kolev, kolego el Gabrovo, pri la helplingvo Esperanto

Trovas, ke konforme al niaj bezonoj pri internaciaj rilatoj estas necesa unu tia lingvo. Tial ke en multaj landoj ĝi jam estas akceptita kaj uzata, la Ĝenerala Konsilio rekomendas ĝin al la membroj de la Bulgara Fervojista Asocio, speciale al la membroj de la Administrativa Konsilantaro kaj al ĉiuj ceteraj estraroj;

Petas la kamaradojn fervojistojn-esperantistojn malnovi kursojn por lernado de Esperanto;

Petas Bulgaran Esperantistan Asocion imputi devon al siaj membroj en Bulgarujo, ke ili donu la necesan helpon tiurilate al la fervojistoj;

Petas la gvidantaron de la fervojista lernejo en Sofio enkonduki en sian programon la devigan instruadon de Esperanto al la lernantoj kaj rekomendas, ke la ĉi-supra rezolucio estu publikigita en gazetoj „Fervojista Batalo“, en revuo „Bulgara Esperantisto“ — Sofio, en „Zelena zvezda“ („Verda stelo“) — Pleven kaj en „Esperantista Fervojisto“ en Prago, Ĉeĥoslovakio.“

Hristo Kolev ne sukcesas realigi ĝis fino sian ideon, ĉar malsaniĝas je tuberkulozo. Laŭ rememoroj de Mara Vasileva Tabakova-Konova, Hristo Kolev forpasis tre juna — fine de 1926 aŭ komence de 1927. Sed

pravaj estas la vortoj, ke ne gravas kiom longe, sed kiel oni vivis.

Bojana PRODANOVA

SINDONA AKTIVULO

La evoluo de la E-movado en la regiono de Popovo estas intime ligita kun la nomo de Dimităr Canev, multjara lektoro kaj sekretario-kasisto de societo „Homeco“.

Naskita en 1911 en Popovo, en familio de metiisto, de sia junaĝo, jam en 1925—kiel lernanto en progimnazio, li eksciis pri Esperanto, aĉetis lernolibron kaj komencis lerni ĝin aŭtodidakte. La sekvan jaron li jam komencis korespondi kun esperantistoj el Francio, Germanio, Italio, Ĉeĥoslovakio k. a. Oni respondis al liaj leteroj. Tio tre ĝojigis kaj entuziasmis lin. Iom post iom li spertigis kaj kuraĝis gvidi E-rondeton por siaj samklasanoj. Post sukcesa fino de la gimnazio li fariĝis studento de agronomio en la Sofia Universitato. Tiutempe la faŝista ŝtato persekutis la E-movadon, la polico faris kelkajn traserĉojn en lia hejmo, forprenis vortarojn, lernolibrojn, leterojn kaj aliajn esperantaĵojn kaj bruligis ilin antaŭ la okuloj de liaj gepatroj, avertante, ke se ilia filo plu okupos sin pri Esperanto, neniu scias kio povas okazi al ni. Eksciinte tion ĉe reveno hejmen, dum la printempaj ferioj de 1935, Dimităr Canev forbruligis la reston de siaj leteroj, kiuj estis kaŝitaj en ligna kesto sub la tegmento de la domo. Policanoj denove venis, sed trovis nenion.

En la jaro 1939, post fino de la militservo, li estis oficigita kiel direktoro de agrikultura lernejo en vilaĝo Baniska, situanta oriente de urbo Bjala.

Ĉi tie la laboro forrabis entute lian tempon. La E-okupoj iom postrestis. Daŭris nur la korespondado kun kelkaj alilandaj samideanoj. Post la 9-a de septembro 1944, kiel rezerva oficiro li partoprenis la duan fazon de la Patrolanda Milito kontraŭ faŝista Germanio. Tute hazarde, en malgranda hungara apudnuba urbo Mohács li renkontis hungaran esperantiston, vizitis lin hejmen, kie ili parolis pri la milito, pri la estonto post ĝia fino, pri Esperanto, pri la paco k. a.

La verda stelo sur la roverso de Jozefo forigis la naciajn barojn. Tiu okazo forte impresis D. Canev, ĝi ludis gravan rolon por lia plua postmilita E-ago.

Post la milito Canev aliĝis al la laboro por kreo de la kooperativa agrikultura mastrumo. En 1969 li faris sukcesan ekzamenon pri E-instruado, en urbo Godeč, en 1970 li instruis en la porinstruistaj kursoj en Godeč, dum la sekvaj jaroj, inkluzive ĝis 1974 — en la someraj internaciaj kursoj en Meden Rudnik, kiujn li forlasis por sia malbona sanstato. Krome, trifoje li gvidis kursojn en Targovište kaj tradicie, ĉiun jaron, en Popovo. De 1958 ĝis 1972 li estas instruisto en la Mezgrada Agrikultura Faklernejo kaj en tiu periodo, dum du sinsekvaj jaroj, instruas Esperanton en la regula programo de tiu lernejo kaj en la Mezgrada Faklernejo pri Maŝinkonstruado. Krome, en la agrikultura faklernejo li aparte organizas dekon da E-rondoj. Dum tiu periodo, per Esperanto li trifoje organizas interŝanĝon de gelnernantoj dum la somera praktiko. Niaj gelnernantoj praktikis en hungaraj ŝtataj kaj kooperativaj mastrumoj, kaj hungaraj gelnernantoj — en niaj. Tiel kreiĝis granda intereso al Esperanto, elkreskis ĝia aŭtoritato kaj populareco. Laŭstatempe Dimităr Canev kolektis abundan materialon pri la E-movado en la regiono kaj preparas broŝuron, kiu baldaŭ aperos.

Todor P. TODOROV,
vicprezidanto de E-societo „Homeco“ — Popovo

LA HOMA SPIRITO VENKOS

Ni konatiĝis en la printempo pasintjara, kiam en Razgrad okazis la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto. Si partoprenis la koncertan programon per siaj versaĵoj verkitaĵoj esperantlingve kaj plenumitaj de la homo, kiu unua rakontis al ŝi pri Esperanto. La saman vesperon mi eksciis pri la neordinara sorto de Lilia kaj decidis nepre viziti ŝin hejme. Post nia renkontiĝo, reveninte Sofion, mi ne povis forgesi tiun junulinon kaj, kiel ni interkonsentis, mi perletere sendis demandojn, por helpi ŝin rakonti pri sia malfacila vivo. Respondante al la demandoj, en sia letero al mi Lilia skribas: „Mi bezonis savon kaj Esperanto venis kiel feliĉa sorĉo. Eble mi havas denaskan inklinon al Esperanto kaj ĝi atendis nur kontakton kun esperantisto por ekflami. . . Al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ mi povus diri multon, sed mi volas nur kredigi al ili, ke la homa spirito venkas, se ekzistas KREDO kaj ESTIMO al la homo, malgraŭ unu malesperiga medicina diagnozo.“

Legante tion mi rememorigas al mi la penson de la amerika verkisto Ernest Hemingway: „La homaro povas esti neniigita, sed ne venkita. . .“ Lilia kredas, ke la homa spirito venkos, ke estas paco sur nia planedo, ke la homaro estos savita de pere. Si ne nur ekzistas — ŝi vivas, agas, spirite venkis la malsanon.

Tiuj el vi, karaj legantoj, kiuj maldormis kun la libro „Mia vivo“ en la manoj — rakonto pri la kruela sorto de Trifon Hristovski, certe trovos similecon inter li kaj tiu modesta knabino el Razgrad. Simila malsano, simila optimisma spirito, simila strebado al beleco kaj bono, simila forta fideleco al Esperanto. Diversaj estas la epokoj, la vivkondiĉoj. . . Mi esperas, ke ankaŭ ŝi, kiel Trifon Hristovski, gajnos per Esperanto-korespondado multajn amikojn tra la mondo. Se vi serĉas seriozan kaj sinceran korespondamikon, bonvolu skribi laŭ adreso: Lilia Nikolova Koleva, 7200 Razgrad, EPJB 7, vñ. 4, ap. 22, Bulgario.

Lilia lernis Esperanton aŭtodidakte, ŝi sendube posedas lingvan talenton — fininte ĉiujn tri gradojn de la foresta kurso ne dum tri jaroj, kiel ordinare, sed nur dum 12 monatoj, en ĉiuj 36 ekzercoj ŝi faris nur 5 erarojn. Si estas homo, kiu, komencinte iun laboron, plenumas ĝin ĝustatempe kaj akurate.

Ci-sube vi havos eblecon konatiĝi kun Lilia per ŝia propra rakonto.

Maria JANKOVA

ESPERANTO EN MIA VIVO

Fininte okan klason en la infansanatorio — urbo Kotel, ni havis lastan kuracistan viziton kaj oni demandis nin: „Kion vi volas lerni?“ Mia respondo venis spontane: „Francan lingvon!“ Subite. . . Kruela ironio mortigis mian entuziasmon per la frazo: „Ha, vi — tradukistino?“. . .“ Cu mi kredis al miaj oreloj? Ja dum ĉiuj ĉi jaroj oni edukis nin, ke la malsano estas venkebla, ke ĝi ne malpliigas la homan valoron. Kro-

me, mi ja neniam diris, ke mi volas traduki. Ekde tiu ĉi momento la revo transformiĝis en strebon. Mi longe ploris kaj promesis al mi nepre esti tradukistino.

La sorto decidis anstataŭ mi kaj alkondukis min en la ekonomian faklernejon en urbo Lukovit. Tie plej kore min akceptis la instruistino de franca lingvo kaj ŝiaj lecionoj fariĝis festoj por mi. La jaroj pasadis — malgraŭ la malfacilaĵoj mi ricevis perfektan diplomon.

Mi revenis en la naskiĝurbon kun espero kaj sopiro rekompenci la prirabitan infanecon de mia pli juna frato, kiu, anstataŭ ludi, devis flegi min, la suferojn kaj la zorgojn de miaj gepatroj, la elspezojn de la ŝtato, certiginta al mi dum 12 jaroj kuracadon, lernadon kaj edukadon. Mi komencis traduki el la franca lingvo, sed iom post iom mi forlasis la librojn kaj la vortarojn, ĉar la laboro, kiun oni disponigis al mi por plenumo hejme, atendis min. Longe, tro longe daŭris miaj labortagoj pro la mallerteco de miaj malsanaj manoj. Post 6-jara laborado mi rajtis ricevi penson. Sed mi ne volis kaj ne povis akcepti la staton de garzito.

En 1981, feriante en la kuraĉloko Momin Prohod, mi vidis verajn admirplenajn armeojn en la okuloj de la esperantisto Zdravko Iliev Velikov el Pleven, kiu translegis miajn versaĵojn, publikigitajn en la Razgrad gazeto. Tre baldaŭ ni komprenis reciproke, ke nia spirita grupo estas egala, malgraŭ la grandega diferenco inter ni. Ni interŝanĝis niajn adresojn kaj forveturis al la naskiĝurboj. Post nelonge mi ricevis leteron de li. En miaj malĝojaj tagoj per liaj rakontoj aperis la verdastelo de Esperanto. Ĝi aperis kvazaŭ por ekgvidi min al la savo! 24-jara junulino, kiu mi estis tiam, ne povas vivi sen celo. En la lastaj decembraj tagoj mi nekuraĝe skribis al mia korespondamiko: Cu ekzistas lernolibroj de Esperanto? La 15-an de januaro 1982 alvenis lernolibro kaj longa letero elradianta kredon. La lernolibro estis donacita kaj mi devis pagi ĝin per lernado — laŭeble fruktodona. Lernolibro kaj kredo — lumo por maltrankvilaj tagoj, por sendormaj noktoj. Post ses monatoj ni ekrespondis nur en Esperanto. Du jarojn mi ne kuraĝis serĉi aliajn geesperantistojn. Du jarojn mi gardis la belegan imagon, kiun mi ne volis perdi.

Foje mia patrino alportis al mi anoncon fare de DE de BEA en Razgrad. Pro netrovebleco de Esperanto-bulgara vortaro mi skribis al la Distrikta Estraro. Baldaŭ okazis jena telefona konversacio: „Mi laboras en DE de BEA. Mi tre bone scias Esperanton. Ni donos al vi vortaron.“ Vere, baldaŭ oni alportis al mi vortaron, insignon, belegajn krizantemojn, bonbonojn kaj esperon, ke mi plu ne vivos solece en mia naskiĝurbo. Mi kaj Milena Georgieva, kiu plej ofte vizitis min, ni decidis korespondi en Esperanto. Sekvis leteroj, telefonaj interparoloj, festaj vizitoj. . . Ni sincere amikiĝis kaj utiligas ĉiujn eblajn kontaktojn. Nome dank’ al ŝi mi komencis lerni en korespondakurso de dua grado. Ekzamenigante, mi faris la kontrolekzercon por tria grado kaj poste la ekzameno okazis hejme. Pro la necesa kompromiso mi kore dankas al la Estraro de la Kursoj en Sofio kaj persone al mia kursgvidantino — Nedka Valjaviĉarska.

Nun mi malhavas la infanan aŭdacon. La ĉinaj rozoj instruas al mi, ke ne ĉiu burĝono ekfloras. Mi benas la renkontiĝojn kun esperantistoj, la kredon, kies forto min savis kaj mi jam estas folieto sur la arbo de la planeda esperantismo.

Lilia NIKOLOVA

Jubilea dokumenta filmo

Kun la pola regisoro-kinodokumentisto Roman Dobrzyński mi konatigis dum la 22-a Tutpola Esperanto-Kongreso en urbo Szczecin, en aŭgusto 1984. Elstara filmisto, ĵurnalisto kaj verkisto, Roman Dobrzyński estas ankaŭ multjara esperantisto. Al la kamerao de R. Dobrzyński ni ŝuldas multajn interesajn dokumentajn filmojn pri latinamerikaj landoj, Portugalio, Hispanio. Lastatempe la Pola Televido kelkfoje elsendis lian filmon pri la fama esperantista komunumo-lernejo „Bona Espero“ en Brazilo, kiu ekzistas jam dekon da jaroj dank' al la iniciato kaj la financa subteno de gesamideanoj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia.

R. Dobrzyński estas ankaŭ aŭtoro de multaj interesaj libroj pri Latin-Ameriko.

Laŭ mia propono li konsentis esti regisoro de filmo sub provizora titolo „ESPERANTO — JARCENTO UNUA“, komisiita al ILEF fare de UEA. Mi kaj Dobrzyński verkis la scenaron. Konsultato estas d-ro Ulrich Lins el FRG, konata historiisto de Esperanto.

La filmon subvencios kaj produktos la firmaoj „Interfilm“ (Bulgario) kaj „Interpress-film“ (Pollando). Ĝi devas esti preta en 1987 — antaŭ la Jubilea Kongreso en Varsovio. Ĉi-somere Roman Dobrzyński estis en Bulgario por filmi kelkajn momentojn de la filmo. Mi kaptis la okazon por interparoli kun li.

— Kion fakte vi filmis ĝis nun?

— En Brazilo kaj en Kubo mi jam filmis momentojn el la ĉiutaga vivo en la bieno-lernejo „Bona Espero“, kurson de Esperanto en la Klubejo de KEA en Havano. Ĉi-somere mi veturis al Hungario, kie mi filmis la ekzamenojn pri Esperanto en la Budapeŝta Universitato kun ekzamenanto prof. Istvan Serdaheily. Poste mi forveturis al FR Germanio — urbo Kolonjo, kie mi filmis la familion de d-ro Lins (lia edzino estas japanino). En julio mi partoprenis la 71-an Universalan Kongreson en Pekino, kie mi sukcesis filmi la plej interesajn momentojn el la riĉega kongresa programo, malnovan kaj modernan Pekinon (pala-

cojn, templojn, religiajn ceremoniojn, la bulvardojn kun miloj da biciklistoj kaj modernaj konstruaĵoj kaj multajn aliajn rimarkindaĵojn). Mi havis la eblecon intervjui prof. Humfrey Tonkin, la novelektitan prezidanton de UEA.

— Kion vi filmis en Bulgario?

— Ho, tiom multe kaj tiom interesajn objektojn, ke mi povus fari filmon nur pri Bulgario kaj pri la bulgara Esperanto-movado!...

Mi havis la bonŝancon filmi arangojn lige kun la festo de IEK en Pisanica, la belecon de Rodopi-montaro, la amikan internacian etoson.

En urbo Razgrad (en la nordorienta parto de la lando) mi partoprenis interesan iniciaton de la esperantistoj el la distrikto — internacian kvizon pri Bulgario kaj pri la bulgara Esperanto-movado, lige kun la 100-jariĝo de Esperanto kaj la 80-jara jubileo de BEA.

En Bulgario mi pasigis neforgeseblajn tagojn, gajnis multajn novajn amikojn kaj kolegojn.

— Kiel vi vidas vian pluan laboron super la filmo?

— Baldaŭ mi vizitos la Internacian E-Muzeon en Vieno, kie mi filmos diversajn dokumentojn, fotojn kaj aliajn arkivajn materialojn, poste mi forveturos al Francio — mi intencas viziti eventuale Grésillon kaj Parizon. Eble mi havos la eblecon intervjui la ĝeneralan direktoron de UNESKO s-ro A. M. M'Bow, pri kio li ĝenerale donis sian konsenton. Poste sekvos filmado en Pollando — en Bjalistoko, Varsovio kaj aliloke, kie vivis kaj laboris d-ro Zamenhof.

Al ĉiuj mi diras: ĝis revido ĝis la tago, kiam sur la ekrano aperos nia jubilea filmo „Esperanto — jarcento unua.“

Intervjuis: Donĉo HITROV

Kvina ISEU

La 11-an — 17-an de julio 1987 en Veliko Tarnovo — iama ĉefurbo de Bulgario, en la loka universitato „Kiril kaj Metodij“ okazos Kvina Internacia Somera Esperanto-Universitato.

CELO: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la partoprenantoj.

PRELEGOS eminentaj bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj-sciencistoj kaj fakuloj.

LIMDATO por aliĝo: 15.06.1987. Validas la poŝtstampo.

ALIĜKOTIZO: por bulgaroj — 80 levoj, por eksterlandanoj — 120 levoj. Ĝi inkluzivas: loĝadon, trifojan ĉiutagan manĝadon, la prezojn de interkona kaj adiaŭa vesperoj kaj tuttaga ekskurso. La fremdlandanoj pagos surloke al la Organiza Komitato; la bulgaroj — per poŝtmandato al adreso: 5000 Veliko Tarnovo, ŝtata Sparkaso, konto 185/5745 de la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio. Ni akceptas aliĝkotizojn nur por la tuta tempodaŭro de la arango.

Loĝado kaj manĝado — en la studentaj komunloĝejoj ĉe la universitato.

La Organiza Komitato de la Kvina ISEU certigas 100-procentan rabaton al tiuj volontuloj, kiuj intencas organizi 10-personajn grupojn kaj gvidi ilin al Veliko Tarnovo. (La gvidanto devas esti la 11-a).

Aliĝilojn bonvolu peti de:

Bulgara Esperantista Asocio,

P.K. 266

BG-5000 Veliko Tarnovo

Bulgario

ORGANIZA KOMITATO

Ni recenzas

UNIKA LIBRO PRI KINOARTO

Dončo Ĥitrov. „En la mirinda mondo de la kino“. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1985. Respondeca eldonisto — Tibor Vaskó. Respondeca redaktoro — Imre Szabó. Formato 16×21 cm, 212 p. Prezo — 1,28 lv. Ofsetpreŝejo de BEA.

La aŭtoro de tiu unika en la Esperanta literaturo libro pri kinoarto, Dončo Ĥitrov, havas multjaran profesion sperton en la kinematografio kiel aŭtoro de scenaroj kaj filmoj, kiel redaktoro de la populara monata bulgara filmrevuo „Filmaj Novaĵoj“. Per la rakonto de juna kinoaktoro li konigas al la legantoj la malsimplan kaj longan vojon de kreado de diversspecaj filmoj, ebligas al ili enrigardi en la „kuirejon“ de la kino, enkondukas ilin en la mirindan mondon de la filmarto. Per agrabla rakontmaniero la aŭtoro kondukas la junajn legantojn tra la kinostudio — tra filmadpavilonoj, laboratorioj de kombinitaj filmbildoj, de muntado kaj sonigado de la filmita materialo; konigas al ili la laboron de piroteknikistoj, ŝminkistoj, filmistoj kaj kinoaktoroj —

unuverte, tiujn procezojn de filma kreado, kiuj kutime estas nekonataj al la plimulto de spektantoj. Tamen en la centro de la aŭtoro atentanta ĉio estas la homoj, kiuj kreas la diversajn specojn de filmoj: ludfilmoj, dokumentaj, popular-sciencaj, pentritaj filmoj k.a. Apartan ĉapitron la aŭtoro dediĉas al historio de la kino kaj al partopreno de infanoj-aktoroj en multaj vaste konataj filmverkoj.

Grava kontribuo por vastigo de la filma kulturo de la legantoj estas la dua parto de la libro — „Konciza filma terminaro“, en kiua aŭtoro faras seriozan provon esperantigi kaj klarigi iujn el la plej ofte uzataj specifaj filmterminoj kaj nocioj, renkontataj en recenzoj kaj artikoloj pri filmarto.

La libro estas abunde ilustrita per dokumentaj fotoj kaj per la originalaj desegnaĵoj de Stojan Dukov, elstara bulgara reĝisoro de pentritaj filmoj, kiuj kompletigas la rakonton de la aŭtoro.

La libro „En la mirinda mondo de la kino“ vekas viglan intereson kaj ĉe la junaj legantoj, kaj ĉe ĉiuj ŝatantoj de la filma arto.

Gerhardt WOHL

YOSHIAKI MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo

(Daŭrigo de n-ro 12/86)

HUNGARIO

Budapeŝto

La 27-an de majo je la 7, 10 horo, mi forlasis Sofion per trajne, kaj, post 15-hora veturado fine alvenis al la ĉefurbo de Hungario Budapeŝto.

La sekvan tagon mi renkontis mian multjaran literamikon s-ron Jozefo Bangha. Li estas 64-jara pensiulo kaj ankoraŭ laboras kiel ĉef-inspektoro de mez- kaj altlernejoj. Li invitis min al sia hejmo, kaj mi decidis resti ĉe li dum kelkaj tagoj.

Posttagmeze de la sama tago Bangha kondukis min al iu altlernejo, kie min akceptis la direktoro s-ro Lajos kaj instruisto s-ino Zsuzsa Barcsay, kiu bone parolas Esperanton. Mi renkontiĝis kun 6 studentoj, kiuj lernas Esperanton sub la gvido de Barcsay. (En Hungario Esperanto estas oficiale enkondukitita en lernejoj kiel unu el fremdaj lingvoj fakultativaj). Mi kontentigis ilian scivolemon per mia rakonto pri aferoj japanaj.

Tiun vesperon mi ĉeestis „Esperantan Renkontigon“, kiu okazis en la Kultura Domo en la sudorienta parto de la urbo. La kunveno, sufiĉe larĝa, estis plenplena de homoj, kiuj interesiĝas pri la Internacia Lingvo, kaj oni ĝuis dekla-

mon de poemoj esperantaj kaj hungaraj, kantojn esperantaj kaj modernajn dancojn. La slogano sur la scenejo estis „Per Esperanto por la Paco“.

La sekvan tagon mi ĉirkaŭrigardis la belan urbon kaj promenis laŭlonge de la fama rivero Danubo. Poste, hejme ĉe Bangha, mi trinkis bonan vinon kaj aŭskultis japanajn melodiojn sur sonbendoj.

Budapeŝto vere meritas la nomon „Reĝino de Danubo“, la plej bela urbo, kiun mi vizitis ĝis nun, kun majestaj parlamentejoj, katedraloj kaj antikvaj domoj. Harmonio karakterizas la tutan urbon. Dum kelkaj tagoj mi vagadis laŭ lastratoj, vidis vidindaĵojn, provis restoraciojn, ktp. Mallonge, mi faris ĉion, kion turisto emas fari. La urbo ne perfidis mian atendon. Mi kunportis Hungaran-Esperantan Vortaron, kaj jam lernis iom pri ĉiutagaj esprimoj de tiu tre unika lingvo.

La 29-an de junio mi translokiĝis al la hejmo de s-ro Oszkár Princz, en la centro de la urbo. Oszkár estas organiza sekretario de Hungara Esperanto-Asocio. Li ĉiam klopodas paroli Esperanton al siaj tri filoj, kiuj havas respektive 6, 4 kaj 3 jarojn. Lia edzino Vera, doktorino pri filologio, kiu instruas ĉeĥan lingvon en la Universitato de Budapeŝto, estas tre gastama kaj simpatias al Esperanto, kvankam ŝi ne

parolas ĝin.

Familio Princz nun planis pasigi la feriojn en sia propra vilao, 20-30 kilometrojn for de Budapeŝto, ĉar Vera jam havas someranlibertempon dum 3 monatoj. Kaj ili forveturis posttagmeze de la sama tago, kiam mi translokiĝis al ilia hejmo Nun mi estis tute sola. Mi havis la tutan domon de Oszkár por mi mem dum du tagoj! Oszkár diris, ke li revenos postmorgaŭ kaj restos kune kun mi, dume liaj familioanoj estos daŭre 3 monatojn en la vilao.

En la domo, sufiĉe granda — kun 4 ĉambroj plus larĝa manĝejo kaj banejo, troviĝis ĉio necesa por komforta vivo. Mi povis bani min, ripozi kiam al mi plaĉas, kuiri kion mi volis manĝi, tute libere laŭ mia volo. Estas ideala situacio, kaj tio ebligas vere dank' al la konfido kaj amikeco inter esperantistoj. Ĉu oni ordinare emas doni sian tutan hejmon kun ŝlosilo al la disponento de preskaŭ nekonata fremdulo? Mi havis grandan impreson pri la bonkoreco de mia amiko Oszkár.

La sekvan tagon, la 3-an de junio, mi renkontis s-ron Markus Gábor, kiu studis en Japanio, en la Universitato Nanzan, en la urbo Nagoya, dum pli ol unu jaro. Li parolas Esperanton malrapide, sed tre ekzakte. Ni kune vizitis muzeojn kaj vastan parkon.

VALORA DONACO EL DANLANDO

Esperanto donis al mi eblecon trovi multajn since-rajn geamikojn ankaŭ en la „Lando de 500 insuloj — Danlando. Inter miaj unuaj kaj plej karaj korespondantoj estas la esperantistoj-fervojistoj Astrid Birkbak kaj Erik Johanson. Ili ambaŭ estas veraj amikoj de Bulgario, tre estimas nian popolon. Precipe ili interesiĝas pri nia historio, pri la ligoj inter la dana kaj bulgara popoloj, kiujn disigas miloj da kilometroj, sed kiuj havas similan sorton.

Multjara revo estis por Astrid kaj Erik veni en Bulgarijon kaj nepre viziti la sanktan por ĉiu bulgaro lokon Ŝipka, kliniĝi antaŭ la heroojo de ĝiaj defendintoj, alportintaj nian liberigon elsub la 500-jara otomana jugo. Inter tiuj bravuloj estis ankaŭ danaj volontuloj, kiuj kuraĝe batalis en la vicjo de la rusaj liberigintoj.

La revo de niaj amikoj realiĝis. Mi kune estis sur Ŝipka, kune vizitis la monumentojn de la herooj-liberigintoj. Poste ni vizitis la historian monaĥejon-muzeon en vilaĝo Ŝipka, kie neatendita kaj agrabla surprizo por ni estis la esperantlingva interparolo kun la afabla ekskursgvidantino.

Nelonge post ilia reveno hejmen mi ricevis valoran donacon de miaj karaj danaj gastoj — luksa libro kun multaj fotoj — reproduktaj de bildoj de rusaj pentristoj, prezentantaj momentojn el la bataloj sur Ŝipka. Sur ĝia kovrilo videblas portreto de belstatura, bluokula viro, vestita en rusa oficira uniformo. Tiu estas la dano-demokrato Einar de Mylius, batalinta kiel

rotestro en la rusa armeo sur Ŝipka. La libro „Alt rolligt i Shipka-passet — Einar de Mylius og Bulgariens Befrielse 1878“, eldono de Det Kangelige Bibliotek en 1982, estas dediĉita al lia heroo kaj nobla agado helpe al la bulgara popolo. Mi tuktore dankis al ili kaj mi skribis, ke por ni bulgaroj tio estas valora dokumento, esprimo de amikeco inter niaj popoloj. Depost tiam ili fariĝis fervoraj kolektantoj kaj esplorantoj de ĉio ligita kun la eventoj sur Ŝipka. Ili kelkfoje sendis al mi eltrancitajn el danaj gazetoj kaj revuoj tekstojn kaj fotojn. Tiu fakto samtempe surprizis kaj ĝojigis min. Mi komprenis, ke mi ne rajtas teni tiujn valorajn materialojn hejme — nur por mi mem. Mi sendis ilin al la Nacia parko-muzeo „Ŝipka-Buzluĝa“ en Kazanlâk.

Antaŭ nelonge mi travivis novan grandan ĝojon. Mi ricevis leteron de la direktoro de la muzeo Penčo Sinkov. Jen citaĵo: „... ni ricevis la senditajn de vi libron kaj aliajn materialojn, ligitajn kun la rusa-turka milito 1877—1878. Ni dankas pro la manifestita de vi atento kaj kunlaboremo. Similaj eldonoj estas aparte valoraj por ni, ĉar ni mem malfacile povus havigi ilin.“ Kune kun la letero mi ricevis akton n-ro 388 de la Komitato pri Kulturo, konfirmita la faritan de mi donacon al la muzeo.

Mi estas fiera, ke dank' al mi kaj al miaj danaj geamikoj Astrid kaj Erik, en tiu sankta bulgara loko — la muzeo „Ŝipka-Buzluĝa“, estas jam materialoj havigitaj per Esperanto. Sed la ĝojo kaj fiero ne estas nur miaj. Mi kredas, ke tiu ĉi agado estas valora kaj nobla, ĝi proksimigas la homojn, atestas pri ilia deziro vivi en paco.

Cvjatko TODOROV

La 4-an de junio Oszkâr revenis hejmen, kaj komenciĝis kunvivado de du esperantistoj en unu sama domo. Ni kune eliris aceti vianon, legomojn kaj aliajn produktojn por vespermango. Mi kuiris por Oszkâr bonan supon kaj freŝan salaton, dum li preparis por mi bongustan ovaĵon. Ankaŭ venis Markus vidi nin, kaj ni interkonsiliĝis pri mia tagordo en la urbo postmorgaŭ.

Oszkâr kondukis min al la oficejo de HEA (Hungara E-Asocio), kie mi aŭskultis multe pri la situacio de E-movado en Budapeŝto kaj Hungario. Ekzistas 23 grupoj Esperantistaj en Budapeŝto, kiesmembroj nombras 600 homoj entute, kaj krome troviĝas alia organizo, fervojista, kun 100 membroj.

HEA eldonas 4 gazetojn kaj revuojn monate, inkluzive la gazeton „Mondo kaj Lingvo“ en hungara lingvo por propagando de Esperanto inter la amasoj, kun eldonkanto de 9 000 ekz.

HEA estas tutlanda organizo kaj havas 7000 membrojn. La dekonon de ĝia ĉiujara elspezo subvencias la ŝtato. Ĉe la librovendejo de HEA mi babiladis kun s-ino Ernestina Lörincz, kiu laboris kiel estrino de libroservejo, okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto.

La 6-an de junio mia amiko Markus gvidis min al la Universitato, kie mi vidis d-ron István Szerdahelyi, mondkonatan esperantologon, kiu tre varme akceptis min kaj klarigis por mi la edukan sistemon de la fako de Esperantologio aŭ Interlingvistiko. Li donacis al mi siajn verkaĵojn, inter kiuj precipe valora estas „Metodologio de Esperanto“ kun vastaj perspektivoj hi-

storiaj kaj interdisciplinaj, sur preskaŭ 400 paĝoj. Mi ankaŭ vidis d-ron János Balázs, direktoron de la lingvistika fako, kiu same donacis al mi multe da sciencaĵoj memverkitaĵ.

Malfrue en la vespero de la sama tago alvenis al nia domo s-ro Dinu Mihai-Julian el Rumanio. Li estas juna kaj parolas Esperanton tre flue. Profesie laboristo, Mihai ne ricevis altan klerecon, sed li estas kompetenta kaj jam kiel ĉefa aktivulo fervore agadas por la aferoj de Rumana Esperanto-movado. Li donis al mi ekzempleron de „Buka-reŝta Informilo“, en kiu oni argumentas kontraŭ la raporto de „Esperanto“ (organo de UEA, decembro 1982), ke la Esperanto-movado en Rumanio ne prosperas. En la „Informilo“ oni citas multe da faktoj por montri la viglan agadon de esperantistoj en tiu lando.

Matene la 7-an de junio mia amiko Markus kondukis min al la Budapeŝta Teknika Universitato. Tie mi renkontis d-ron Ottó Haszpra, kiu estas fama scienculo pri hidrologio. Li tre lerte parolas Esperanton kaj montris al mi amason da materialoj pri la apliko de Esperanto en scienca literaturo.

Laŭ lia opinio jam maturiĝis la tempo, kiam Esperanto ludu gravan rolon en la scienca mondo. La lingvo estas pli taŭga ol iu ajn nacia lingvo en la instruado de sciencoj kaj teknikoj al la studentoj el evoluantaj landoj. Oni devas eldoni sian atingon unue en Esperanto, alivorte necesas ke abundu unuarangaj informoj, kiujn oni povas akiri nur per Esperanto. Mi ne estas fakulo en tiu kampo, sed bone kom-

prenis la gravecon kaj eblecon pri aplikado de Esperanto en scienco kaj teknologio.

La sekvan tagon mi havis ŝancon detale aŭskulti de Mihai pri la situacio de Esperanto-movado en Rumanio. Ankoraŭ ne ekzistas tutlanda organizo en tiu lando, sed jam troviĝas ĉirkaŭ 3000 organizitaj esperantistoj, kiuj vigle laboras por la disvastiĝo de la lingvo.

Posttagmeze mi kaj Mihai banis nin en la baseno de la varma fonto Szecheny, kien nin gvidis per aŭto s-ro Borszèki Ferenc, instruisto pri angla lingvo. Li parolas Esperanton mallerte, sed klopodis paroli dum la tuta tempo, por amuzi la fremdlandajn gastojn.

La 10-an de junio mi ripozis tutan tagon, promene en belega parko en la Insulo Margit sur rivero Danubo. Transflanke staris la antikva kastelo. Freŝis la aero, bluis la ĉielo. Mi rememoris la melodion „Bela kaj blua Danubo“.

Vespere de la sekva tago mi vizitis la semajnan kunvenon de la Esperanto-Klubo „Egressy“, kiu estas unu el la plej prosperaj grupoj en Budapeŝto. Ĉeestis 15 klubanoj kaj ni kune babiladis, aŭskultis prelegon de muzikinstruistino pri „Ritmo en la mondo kaj la vivo“ kaj aldone aŭskultis lertan ludon de violono fare de fama violonistino.

La 12-an de junio mi estis ege okupita la tutan tagon. Antaŭtagmeze, mi renkontiĝis kun s-ro Vilmos Benczik, kiu estas jam konata en Japanio, ĉar li vizitis nian landon kaj prelegis en diversaj lokoj. Li tre flue parolis Esperanton kaj ni diskutis ĉefe pri la ekonomia situacio de Hungario. Jam sukcese

FERVOJISTA KONFERENCO

La VI konferenco de la IFEF-sekcio ĉe BEA okazis en Blagoevgrad la 1-an kaj 2-an de novembro j.k. Partoprenis reprezentantoj de 10 fervojistaj E-societoj. Krome, aliĝis ĉirkaŭ 70 personoj el Varna, Ruse, Gorna Orjaĥovica, Stara Zagora, Plovdiv, Kjustendil, Sofio, Blagoevgrad k. a. La plej maljuna partoprenanto estis la 88-jara Dimitar Borisov, kiu antaŭ 40 jaroj laboris en la stacidomo de Blagoevgrad.

La gastamaj dommastroj tre bone estis organizintaj la konferencon. La esperantistoj-fervojistoj trarigardis la belan kaj modernan urbon, vizitis memorlokojn de herooj pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo. Dank' al la bone aranĝita muzea ekspozicio ni konatiĝis kun la vivo kaj agado de Georgi Izmirlijev-Makedonĉeto, kiu heroe batalis por la liberigo de Bulgario elsub osmana jugo, vizitis ankaŭ la urban ekspozicion, de artaĵoj kie estas verkoj de Vladimir Dimitrov — la Majstro, de Nikola Mirĉev kaj aliaj kreantoj. Nia anaro estis tre kontenta kaj danka.

La konferenca laboro pasis bone, ĉiu aktive kaj disciplinite partoprenis. Ni dankas al la dommastroj, kiuj malfermis la konferencon per junpionira ĥoro el Simitli. La grupeto kantis bele kaj deklamis esperantajn versaĵojn. Eksonis „Gardu la pacon“ de Asen Grigorov. . . Senĉesaj koraj aplaŭdoj rekompencis la junajn esperantistojn.

Kamarado G. Litov, nia prezidanto, raportis pri la faritaj agoj kaj pri la partopreno de niaj delegitoj en la IFEF-kongreso en Skopje.

La prezidantoj de niaj fervojistaj esperantistaj organizaĵoj ankaŭ faris siajn raportojn.

Dum la konferenco reliefigis tri gravaj taskoj: daŭrigo de la porpaca batalo, zorga lernado de la lingvo, plibonigo de la laboro de „parolantaj rondoj“. Estis decidite, ke venontjare, dum la konferenco de la IFEF-sekcio, okazonta la 19-an-20-an de septembro 1987 en Varna, la partoprenantoj parolu nur en Esperanto.

Georgi NEJKOV

plenumiĝis reformado en agrikulturo, kaj la dua tasko estas tiu de industrio, li diris. Post la intervjuo, ni ridis, ke nia diskuto estis kvazaŭ inter ekonomiistoj, ne inter esperantologoj.

Tagmeze mi manĝis kun s-ro Laczó Nándor, kiu ne estas esperantisto, sed memlernis japanan kaj ĉinan lingvojn, kiujn li bone parolas. Kun granda plezuro ni babilis pri diversaj aferoj, ĉefe en ĉina lingvo.

Poste Markus akompanis min al la Universitato, kie min akceptis s-ro Yamaji Masanori, profesoro de japana lingvo, kaj Prof. Kara György, la ĉefo de la Orientlingva Katedro, kaj samtempe mondkonata fakulo pri mongola lingvo. Mi ankaŭ vizitis la eldonan sektion de Hungara Esperanto-Asocio trans la rivero Danubo. Ĝi okupas tre vastan kaj elegantan konstruaĵon, kie oni laboras pri redaktado kaj eldonado de libroj kaj aliaj presaĵoj, inkluzive tiujn de UEA.

Eger

Eger estas urbo, kiu situas nord-oriente de Budapeŝto je ĉirkaŭ du horojn da veturado per trajno. La 14-an de junio mi vizitis tiun urbon por esplori ankoraŭ alian angulon de Esperantujo. Ĉe la stacidomo min atendis s-ro János Zakár kaj s-ro József Csáki. La unua estas 62-jara pensiulo kaj sekretario de Egera Esperanto-grupo kaj la dua estas eksfiscisto, iom malpli aĝa, kaj sekretario de departementa komitato de HEA. Mi ankaŭ vidis s-ran Ernő Kőnczöl, prezidanto de la Grupo. Mi ĉirkaŭrigardis la urbon

sub gvido de Zakár kaj Csáki. La urbo kun ĉirkaŭ 66 000 loĝantoj estas tre bela. Al mi plaĉis ĝia kvietata atmosfero kun ruinoj de malnova kastelo kaj grandioza katedralo — Egera Baziliko.

Vespere mi ĉeestis la semajnan kunvenon de la junulara sekcio de la grupo „Verda Stelo“, kie kunvenis ĉirkaŭ 15 samideanoj. La plejparto estis ankoraŭ komencantoj. Oni petis min paroli, kaj mi rakontis pri mia vojaĝo kaj pri Japanio, montrante diapozitivajn de japanoj. Allogis ĝeneralan intereson la paperartaĵoj: gruoj, kaskoj, ktp., kiujn mi faris antaŭ la okuloj de la ĉeestantoj.

Post la kunveno oni kondukis min al la loko, kie staras tradiciaj vintrinkejoj. Oni fosis grandajn kavernojn en rokeca monteto ekster la urbo kaj tie metas grandegajn barelojn de vino, kaj en tiuj unikaj bufedoj oni povas gustumi bonan vinon.

Mi aŭdis, ke en Eger aktivis ĉirkaŭ 200 esperantistoj, kaj inkluzive la najbarajn regionojn, troviĝas entute 800 grupanoj. Kompare al la loĝantaro, tio estas sufiĉe granda cifero.

Mian lastan tagon en Eger mi pasis kun Csáki, vizitante la kastelon kaj la altlernejon, kiu havas 200-jaran historion.

Lago Balatono

La 16-an de junio s-ro Ferenc Simon venis akcepti min, kaj mi translokiĝis al lia hejmo, en la alia parto de Budapeŝto. Ferenc estas mezjara inĝeniero pri konstruado. Li nur balbute parolas Esperanton,

sed ni komprenis nin sufiĉe bone.

Lau lia propono, ni kune vizitis la faman lagon Balatono, nomitan „la Maro de Hungario“. Post du kaj duono da horoj per trajno ni atingis la lagon. La ĉirkaŭaĵo de la lago estas grandega ripozloko kaj precipe somere venas ĉi tien multaj fremdlandaj turistoj.

Tie atendis min s-ino Ibi Falusi, edzino de Ferenc, kiu laboras provizore en la ripozejo de iu ministerio, kie ŝi estas oficistino. Mi estis tre kontenta pri la panoramo de tiu bela lago kaj pri la promenado laŭlonge de la bordo. La sekvan tagon ni veturis per ŝipo trans la lago al vilaĝo Badacsony, fama pro sia bona vino. Nenio vere mankis por nia plezuro! . . .

B u d a p e ŝ t o (ankoraŭfoje)

Reveninte al la ĉefurbo, la sekvan tagon mia amiko Markus gvidis min al la domo de s-ro Károly Fajsz, mondkonata kolektanto de Esperantaj libroj, periodaĵoj kaj aliaj E-materialoj. S-ro Károly Fajsz mem administras la bibliotekon. Ĝi enhavas pli ol 6000 titolojn, pli ol 1000 jarkolektojn de periodaĵoj kaj ankaŭ ĉirkaŭ 5000 specojn de periodaĵoj ankoraŭ nearangitaj. S-ro Fajsz dediĉis ĉion — monon, tempon kaj eĉ vivon, al la biblioteko!

La 20-an de junio mi vespermanĝis kun Ferenc kaj Markus en bona hungara restoracio. Tio estis por mi la lasta vespero en Budapeŝto. Sekvan matenon Ferenc akompanis min al la stacidomo, kaj mi fine forlasis la urbon kun multaj karaj rememoroj.

(Daŭrigota)



Ivajlo BALABANOV

KONTRIBUO AL LA EŬROPA HISTORIO

Eŭropo kiam — juna kaj libera —
legadis sian kavaliromanon,
survoje tiam, antaŭ sunapero
pereis nia kavaliro Ŝiŝmano.
Eŭropo jam pri Julieta ploris,
ĝi jam parolis pri l' muzik' de Bach.
Ĉe ni, en la Trakia kamp' perfortis
kaj hurlis la luparoj de Alah'.
Eŭropo — ĉirkaŭita de lakeoj —
en lukso dronis ĝia reĝa moŝt'.
Ĉe ni, en la bazar' Tesalonika bejoj
aĉetis kristaninojn kvin por groŝ'.
Ĝi kiam katedralojn kaj kastelojn
konstruis, en l' arbaroj de l' Balkan'.
priploris ŝalmoj — tristaj kaj mielaj —
la morton de hajdut' Stojan'.
Leviĝis alte fortikaĵoj sangaj,
faritaj el tranĉitaj kapoj, kaj
la Land' fiero de hajdutaj agloj
nekonkerita fakte restis, kvankam
ne estis ĝi pli granda ol kalpako
kaj larĝa kiel piedsigno de leon'.
Sed ĝi fariĝis lupa kav' — obstaklo
el ostoj kaj el sang'. Terura tomb'!
Kun simplaj bastonegoj, kun silikpafiloj,
kun sagoj el cikuto en la man' —
jen tiel ĝin, Eŭropon, ŝirmis avoj niaj
kaj ne atingis ja Parizon l'otoman'.

El la bulgara: Venelin MITEV

José Fernandez ARROYO (Hispanio)

ARBARO

(Rememoro pri Vitoŝa-arbaro.
Vilaĝo Dragalevci apud Sofio,
oktobro 1985)

Ne pri l'arbaro.

Ke neniu parolu pri l'arbaro,
ĉi vort' terura, sombra, profunda, muta, stranga
susura kaj mistera.

Ke neniu parolu pri l' arbaro, se li ne estis iam,
iufoje, dumtage aŭ dumnokte,
perdita en la ĉarmo de ĝia kor' senfina.
Perdita, sola, sen elir', timema,
senhelpa, meze de fantomamaso
de trunkoj, branĉoj, foliaro, herboj,
ene de tiu ombra visco kio zumas
la elspiro lantega de la mondo.

Ha, jes... l' arbaro! Tiu labirinto
sen vojoj, sen destino, sen iro nek reveno,
kie nur certajn voĉojn alprenas la silento:
la voĉo de la besto kiu fuĝas aŭ flugas,
la voĉo de la branĉo kiu mistere falas,
la voĉo de l'folioj kie la vent' susuras,
la voĉo neaŭdebla de l' timego,
ha, jes, la flustra voĉ' insida de l' teruro...

Kaj, kien iri? Kie la eliro?
Ĉu oriente? Kie estas nordo?
Kiel trovi la perditajn paŝojn?

Ĉirkaŭe, sole trunkoj
indiferentaj, mutaj, staras;
interplektitaj branĉoj, foliaro, humo,
la humida kuseno de mortaj vegetaloj,
kie la piedo ne lasas spurojn,
kie la korpo emas kuŝi,
sin etendi,
mole ripozi,
sin redoni al la patrino sino de la tero
kaj de tie rigardi — okulduonferminte —
ĉi majestatan kupolon de arba katedralo,
kie trembrilas supren
la neebaj eretoj de la ĉiela lumo...

Ho, jes, tie sterniĝi kvazaŭ restaĵo homa,
negrava ŝelo korpa returne l'originon,
kaj forgesi la vojon, kaj resti nur, eniĝi
en la genezan fonton, kie la vivo pluas.
Sed, ne. Eble ankoraŭ
iu bezonas nin, iu nin vokas,
eble iu, kun amo, prononcas nian nomon.
Do, mi revenu, serĉu la eliron.
Ombroj densiĝas, noktobirdoj grakas,
la dornaj branĉoj volas nin reteni,
falintaj trunkoj baras niajn paŝojn.
Sed la piedoj iras, lante, certaj:
l' arbaro malfermiĝas, kaj jen la vojo, jen denove...

Nun tiam, jes, parolu pri l' arbaro.

(El ĵus aperinta poemkolekto „Verda Fumo“)

Anna ALKSNIS

FILANDRAJ TAGOJ

(Postsomero)

Ora folifal' vualas la mondon. Kaj tagoj filandraj
al sun' sonoras pri paŝt' de radi-leporetoj brilantaj
Tra flavaero acer' ekscentilis oranga.
oraj betulaj folioj aliĝis al herbeja frango.

Svingas per sorĉa aŭtuna peniko l' arbaro kun amo,
tie-alie ekflagras sorparba skarlata ornamo.
Tuta naturo moviĝas kaj vigle ĝojvivas,
al preto por granda fest' adiaŭa aŭtuna aktivas.

Erinacido jen trenas ruĝpompon sur la dorso pingla,
duan porcion da fungoj sekigas sciur' sur la pino.
Trenas formik' agrostidan pecon kiel trabon,
la oldulcto-fung' levis de muska kuseno la kapon.

Oraj kaj ruĝaj folioj senhaste flugas al la tero,
jam perdiĝas la varmspira beleco somera...
Sidas paruo sur branĉo en medit-observo —
kiel alportas aŭtunan triston tagoj filandraj belaj.

Eĉ sunradioj en tristo lumas kun helo!
Kiu do veas pro paso de l' temp' kun malĝojo abisma?
Vivo eternas ja! Ĉio denove kun belo
certe revenos al ni kun esper' optimisma!

Anna Alksnis el Litovio havas vastajn kulturajn interesojn — ŝi estas ĵurnalistino antaŭ malsaniĝi je poliomjelito, sekve de kio paraliziĝis. Sed malgraŭ ĉio, ŝi amas la vivon. Tiuj faktoj oni nepre scii, por kompreni ŝiajn versaĵojn.

Unu el ili ni publikigas ĉi-sube al la afableco de la bulgara korespondantino de Anna Alksnis, Maria P. Angelova, kiu disponigis ĝin al ni.

KELKAJ KONSIDEROJ PRI FRAZEOLIAJ ESPRIMOJ KAJ ESPERANTO

La demando kiel traduki en Esperanton tiun aŭ alian esprimon estas tute ne maltrafa. Certe L. Miĥajlov, aŭtoro de la artikolo „La frazeologiaj esprimoj kaj Esperanto“ („BE“, 1986/1), pravas substrekante, ke oni tradukas tekston, ne esprimon. Sed traduki — tio signifas en la alia lingvo konservi ĉiujn aŭ preskaŭ ĉiujn proprajn de la originalo — sencon, laŭeble formon, ritmon, rimon kaj ankaŭ koloron, kiu lasta ofte estas ŝuldata al la frazeologiaj esprimoj. Laŭ mi la tradukita teksto certe ne povas esti fidela al la originalo, se eĉ unu el la supre menciitaj komponantoj mankas.

Cu Esperanto havas frazeologiajn esprimojn? Jes! Kaj ekzistas ankaŭ grundo, sur kiu ili bone kreskas.

Nacioj, ricepe nuntempe, ne vivas tute izolite — ili kunvivadas, ligitaj per multaj fadenoj de ekonomio, politiko, kulturo, ktp. Tio koncernas unuavice naciojn loĝantaj en samaj regionoj. Ni povas plenkonscie paroli pri kristana kulturo, islama kulturo, eŭropa kulturo, pri kulturo de Afriko, ktp. Dirante, ekzemple, „eŭropa kulturo“ ni subkomprenas, ke ekzistas multaj elementoj pli-malpli komunaj en ĉiu aparta nacia kulturo eŭropa.

Ĉiu nacia kulturo enhavas, miaopinie, du partojn — internaciigita parto, t. e. tio, kio ligas ĝin kun aliaj kulturoj, kaj nacia parto — tio, kio faras tiun ĉi kulturon memstara, facile distingebla inter aliaj. Internaciigo de diversaj flankoj de l' homa vivo komenciĝis jam delonge. Rememoru tiurilate la vortojn de V. I. Lenin: „La tuta ekonomia, politika kaj spirita vivo de l' homaro internaciigas jam sub kapitalismo, socialismo ĝin entute internaciigas“. Vera internacia kulturo, kompreneble, ankoraŭ ne formiĝis — ne estas maturaj sociaj kondiĉoj por tio, tamen multaj flankoj de la homa vivo jam delonge samas ĉe malsamaj nacioj.

Lingvo, estante parto, flanko de la kulturo, samtempe manifestas kulturon. Esperanto kiel lingvo internacia manifestas tiujn internaciigitajn partojn de multaj kulturoj. Lingve tio eventigas plejparte en leksiko kaj ankaŭ en frazeologio. Sciencistoj instruas, ke ekzistas ne nur internaciigaj vortoj, sed ankaŭ internaciigaj esprimoj. Vidu, ekzemple: *angle* — *to close one's eyes to smth*, *germane* — *die Augen vor etw verschliessen*, *russe* — *zakryvatj glaza na*, *esperante* — *fermi la okulojn pri io*; *russe* — *bytj pod baŝmakom*, *pole* — *być pod pantofflem*, *france* — *être sous la pantoufle*, *germane* — *unter dem Pantoffel stehen*, *angle* — *to be under smb's heel/shoe*, *esperante* — *esti sub la ŝuo/kalzano*. Daŭrigu tiun ĉi aron!

La simileco de esprimoj estas rezulto de grunda simileco kaj unueco de la homa vivo. Certe ĉiu lingvo posedas nombrojn da esprimoj unikaj (bitj bakluŝi, coup de Jarnac, to walk bodkin, ktp), tamen grandega parto da esprimoj en multaj lingvoj similas.

Plue, Esperanto estas lingvo internacia, ĝi unuigas lingve multmilan homan kolektivon, socion de personoj diversnaciaj. Tiu socio havas sian historion (ne gravas, ke mallongan!), siajn tradiciojn, kutimojn, verkistojn, eĉ heroojn finfine. Ĉio tio ebligas fundamenton por formiĝo de fenomeno tre simila al memstara kulturo, nomu ĝin — apud-Esperanta kulturo, kies radikoj enprofundiĝas en naciajn lingvojn kaj kulturojn de personoj Esperanton uzantaj. Kaj tio estas alia fonto de Esperantaj frazeologiaj esprimoj.

Leonid MJASNIKOV, USSR



KONFERENCO DE IPT E A-NOJ

La 25-an kaj 26-an de oktobro 1986 en la pitoreska urbo Kazanlâk okazis la VIII scienc-teknika konferenco de la poŝtista kaj telekomunikista sekcioj ĉe BEA kun uzado de Esperanto.

Gian laboron partoprenis pli ol 40 poŝtistoj-esperantistoj el la tuta lando, reprezentantoj de la Distrikta Estraro de BEA en Stara Zagora kaj gastoj el la loka socio „Roza Valo“.

Dum la konferenco, dediĉita al la Internacia Jaro de la Paco, estis prezentitaj raportoj intime ligitaj kun la evoluo de la komunikado en PR Bulgario kaj kun la enkonduko de teknika progreso kun aplikado de internacia sperto en la regiono de Kazanlâk.

Estis emfazita la uzado de Esperanto... por realigo de profesiaj kontaktoj. Prezentitaj estis jenaj raportoj: „Faksimila komunika sistemo-Bulfaks“ — prezentita de ing. Georgi Stoilov — kandidato de la teknikaj sciencoj ĉe la Scienc-Esplora Instituto pri Komunikado, „Aŭtomata subteno de la telefonaj sistemoj“ kaj „Evoluo de la poŝtaj komunikoj en Bulgario dum la 9-a jarkvino kaj ĝis la 2000-a jaro“ — de la specialistoj Ivan Jordanov kaj Draguŝko Petrov. Post la raportoj sekvis diskutoj.

Fine de la konferenco Draguŝko Petrov projekciis lum-bildojn el USSR, Mongolio kaj Ĉinio kaj rakontis siajn impresojn pri la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, Ĉinio.

D. NIKOLOV

UTILA RENKONTIGO

La 18-an kaj 19-an de oktobro 1986 en Drjanovo-monaĥejo — monumento de la heroo bulgara historio, okazis E-festo. Partoprenis pli ol 100 geesperantistoj-turistoj el Veliko Târnovo, Velingrad, Gâlâbovo, Pavlikeni, Polski Trâmbeŝ, Ruse, Sumen, Gabrovo, k. a.

La renkontigon, dediĉitan al la Internacia Jaro de la Paco kaj al la centjariĝo de Esperanto, ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la Komitato por Pacdefendo en Drjanovo Stanĉo Stanev, Dimităr Dimitrov el la Urba Komitato de BKP, Vanja Minĉeva el la Komitato pri Kulturo kaj Milko Iliev, reprezentanto de turista socio „Baĉo Kiro“.

Raporton pri la agado de E-societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo kaj pri ĝia kontribuo al la batalo por pacdefendo tra legis la prezidanto de la socio Geno Manev. Li substrekis, ke en 1981 sub la Apelo de la Kvakera E-societo el Britio kontraŭ la raketoj en Okcidenta Eŭropo, la drjanovaj geesperantistoj kolektis 5 411 subskribojn kaj en 1986, sub la Apelo de Hiroŝima kaj Nagasaki, kontraŭ la nukleaj armiloj — 5 708 subskribojn. Li parolis ankaŭ pri la internaciigaj ligoj de la esperantistoj en Drjanovo.

La ĉeestantoj akceptis apelon „Gardu la pacon!, kiu estos sendita al multaj honestaj homoj tra la tuta terglobo.

Elisaveta KARAIVANOVA

KAŝTANA VESPERO EN PETRIĈ

La 18-an kaj 19-an de oktobro 1986 E-societo „Esperanto Triumfonta“ en Petriĉ jam sepan fojon okazigis la popularan Kaŝtanan Vesperon. Esperantistoj el 17 urboj kunvenis en la koketa montodomo „Belasica“, ĉirkaŭita de centjaraj kaŝtanoj.

La ĉeestantojn salutis la prezidantino de la Komunuma Konsilantaro pri Kulturo Anna Hantova kaj la prezidanto de la societo-dommastro. Sub lia gvido junpionira horo plenumis riĉenhavan artprogramon. Agrablan etoson kreis la muzika-satira ensemblo „Prin-tempo“, ĉe la Modela Popola Legosocieto „Fratoj Miladinov“ en Petriĉ. En tiu ĉi ensemblo partoprenas la esperantistoj Kiril Ĥlebarov, Dimitar Tušinov, Po-beda Truškova kaj Maria Ĥristova. Trio „Sekerinov“ plenumis malnovajn urbajn kantojn, la veteranoj de la ensemblo Ĥristo Loboŝki kaj Saŝo Polizoev — humuraĵojn.

Laŭtradicie, sur la manĝtabloj abundis sudaj fruktoj: granatoj, arakidoj kaj kaŝtanoj. La festo daŭris ĝis la dua horo post noktomezo — per popolaj dancoj kaj kantoj.

Dimanĉe matene al la gastoj estis demonstrita rostando de kaŝtanoj laŭ la loka maniero, post kio multaj el ili enprofundiĝis en la maljunan kaŝtandensejon por kolekti por si men dolĉajn, bongustajn kaŝtanojn.

La partoprenantoj en nia Kaŝtana Vespero certe longe memoros la tiel agrable pasigitajn du tagojn.

Kiril ĤLEBAROV

OLIMPIKA ARBARO



Esperantista societo „Nikola Sopov“ en Dimitrova Subdistrikto — Sofio, organizas vicon da aranĝoj kunlabore kun la Patrolanda Fronto kaj aliaj amasaj organizaĵoj.

Ĉiuj membroj kaj amikoj de Esperanto entuziasme aliĝis al la iniciato de ĵurnalo „Oteĉestven Front“ planita Olimpika Arbaro.

Forstistaj aŭtoritatuloj disponigis al ni areon por semado. Dum la tuta monato ni kolektis glanojn de ruĝa kverko, kiu rapide kreskas kaj posedas tre valorajn kvalitojn. En la difinita por la esperantistoj sulko en la arbarmastrumo apud vilaĝo Lokorsko la 1-an de novembro ĉi-jare ni semis la kolektitajn de ni 140 kilogramojn da glanoj. Ni esperas ricevi pli ol 20 000 kverkidojn, kiujn ni liveros senpage por kreskigo de Olimpika Arbaro.

Tio estas granda honoro por ni, ĉar ni faris tiun nian kontribuon dum la Jaro de la Paco — 1986.

Ni alvokas al la esperantistoj el Sofio kaj al ĉiuj, al kiuj estas kara la „verda riĉaĵo“ de nia lando kontribui por ĝia plimultigo.

Ilija PANKOV,
estrarano de E-societo
„N. Sopov“

POR PURA ĈIELO

La 23-an de oktobro laŭ iniciato de la ĉefurba Pacdefenda Komitato okazis Pacmarŝo'86. Partoprenis reprezentantoj de la pacmovado de Sovet-Unio, aktivuloj de la distriktaj pacdefendaj komitatoj en Sofio. Ili pasis laŭ la itinero Sofio-Smoljan por esprimi la grandan deziron de la soveta kaj bulgara popoloj vivi en paco.

En Plovdiv, dum mitingo organizita sur la terito rio de la Tabakinstituto, per emociaj vortoj al la partoprenantoj sin turnis la partia sekretario de la Instituto, kiu parolis pri la granda maltrankvilo de ĉiuj homoj en la mondo pro la kreskanta militdangero; parolis ankaŭ Galina Voskresenskaja — prezidantino de la Moskva Urba Pacdefenda Komitato. Ŝi esprimis sian kredon, ke la mondo trovos fortojn por ĉesigi la frenezon de la militemuloj.

En Ĉepelare la partoprenantoj en la marŝo vizitis la natursciencan muzeon kun riĉa kaj altvalora kolekto de mineraloj. Nia vojo preterpasis la majestatan monumenton de la fiera rodopa aglo — la partizano-esperantisto Diĉo Petrov. Per ruĝaj dianoj ni esprimis nian profundan estimon al lia senmorta faro. Eksonis la emociaj vortoj de Ljubov Pavlovna — vicdirektorino de Sukombinato en Moskvo, kiu rememorigis pri la gravaj perdoj, kiujn donis ŝia patrolando dum la lasta milito.

Fincelo de la pacmarŝo estis la blanka sunplena urbo Smoljan. Planedario, etnografia muzeo, pentroarta galerio — jen la lokoj, kiujn vizitis la partoprenantoj en la marŝo.

Returne al Sofio, en la ornamita per bluj flagetoj aŭtobuso sonis versoj kaj kantoj pri paco. Denove eksonis la vortoj de Galina Voskresenskaja, kiu bondeziris al la partoprenantoj en la pacmarŝo pluraĵajn feliĉajn pacajn jarojn.

Adelina SVEŜTAROVA

FRUKTODONA KUNLABORADO

„XXI jarcento — sen nukleaj armiloj“. Sub tiu slogano pasis la organizita en Sumen tuturba kunveno dediĉita al la Tago de UN kaj al la Semajno de UN por senarmado. La aranĝon partoprenis ankaŭ grupo da esperantistoj-pacbatalantoj. Kun intereso ili aŭskultis la paroladon de la multjara sociaganto kaj granda amiko de Esperanto Angel Videnov — prezidanto de la Distrikta Pacdefenda Komitato. Li subskrekis, ke Bulgario estas inter la 53 ŝtatoj, kiuj proponis, ke 1986 estu proklamita Jaro de la Paco. La oratoro detale parolis pri la paciniciatoj de USSR, kies plenumado garantias neniigon de la nukleaj armiloj ĝis la fino de nia jarcento kaj konservon de la vivo sur la Tero.

Multjara estas la aktiva kunlaboro inter la Sume-naj esperantistoj kaj la Komunuma Pacdefenda Komitato (KPK). Nova pruvo pri tiuj intimaj rilatoj estas la fakto, ke antaŭ nelonge Ĉvjatko Todorov — prezidanto de „Vekiĝo“ — la unua E-societo en Bulgario distingita per la Honora Insigno de MEM, estis elektita membro de la Buroo de KPK, kaj Olga Gerasimova — membro de la Pleno de KPK.

C. STOJANOV

NACIAJ, INTERNACIAJ KAJ REGIONAJ ARANĜOJ DE BEA DUM 1987

N-ro	ARANĜO	DATO	LOKO	ORGANIZANTO
1.	Naciaj porinstruistaj feriaj kursoj (I, II kaj III grado)	16—25. I.	Jambol	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
2.	Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE)	25—26. I.	Kubrat	E-societo „Progreso“ — Kubrat
3.	Regiona kvalifika seminario por E-aktivuloj	14—15. III.	Plovdiv, Varna, Razgrad	Organiza Komisiono ĉe CE de BEA
4.	Regiona kvalifika seminario por E-aktivuloj	21—22. III.	Burgas, Pleven	Organiza Komisiono ĉe CE de BEA
5.	Regiona kvalifika seminario por E-aktivuloj	28—29. III.	Sofio-urbo, Sofio-distrikto	Organiza Komisiono ĉe CE de BEA
6.	Naciaj porinstruistaj feriaj kursoj (I, II kaj III grado)	1—10. IV.	Jambol	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
7.	V metodika seminario „Instruado de Esperanto al progresintoj“ (kun internacia partopreno)	1—7. IV.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
8.	Renkontiĝo de ŝakistoj-esperantistoj el la distriktoj	4—5. IV.	Sofio	Sekcio de la Ŝakistoj-Esperantistoj
9.	„Siringa Vesperto“ kaj konkurso de originala kaj traduka poezio	18—19. IV.	Loveĉ	DE de BEA kaj la Sekcio de Esperantistoj-literaturistoj
10.	Konferenco de Agrikulturaj specialistoj-esperantistoj (lige kun 25-jariĝo de la Sekcio de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj)	18—19. IV.	Stara Zagora	Sekcio de Esperantistoj-Agrikulturaj Specialistoj
11.	Renkontiĝo de esperantistoj-matematikistoj kaj specialistoj pri cibernetiko	18—19. IV.	Stara Zagora	Sekcio de Esperantistoj Matematikistoj
12.	Seminario de esperantistoj-kolektantoj (kun sciencaj raportoj)	25—26. IV.	Pisanica	Sekcio de Esperantistoj-Kolektantoj
13.	Renkontiĝo de prezidantoj kaj sekretarioj de medicinaj societoj, kluboj kaj grupoj	25. IV.	Veliko Târnovo	Sekcio de Medicinistoj-Esperantistoj
14.	Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo	8—10. V.	Plovdiv	DE de BEA, Plovdiv
15.	Junulara esperantista turista renkontiĝo	9—10. V.	Târgoviște, mondomo „Juneco“	E-societo „Verda Eskadrono“
16.	Renkontiĝo de esperantistoj-juristoj	16. V.	Bankja	Sekcio de Juristoj-Esperantistoj
17.	Distrikta renkontiĝo de mezlernejanaj-esperantistoj — „La Paco — espero de la planedo“	16—17. V.	Jambol	DE de BEA — Jambol; DE de la Komsomolo (DKJU)
18.	Konferenco de virinoj-esperantistinoj	16—17. V.	Jambol ;	Sekcio de Virinoj-Esperantistinoj

N-ro	ARANĜO	DATO	LOKO	ORGANIZANTO
19.	Literatura konkurso „Revolucia pasinteco, nuntempo kaj estonto de Stara Zagora kaj la distrikto“ (kun internacia partopreno)	16—17. V.	Stara Zagora	DE de BEA, Stara Zagora
20.	Turista Esperantista Renkontiĝo	24. V.	Bankja	Sekcio de Turistoj-Esperantistoj
21.	Jarkunveno-renkontiĝo de esperantistoj-veteranoj	30—31. V.	Kazanlâk	Sekcio de Esperantistoj-Veteranoj
22.	Partopreno en la internacia konferenco „SVIEKO '87“	25—30. V.	Svištov	Sekcio de Ekologoj-Esperantistoj
23.	Internacia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj revolucia poezio	29.V.—3.VI.	Vraca	DE de BEA — Vraca
24.	Nacia celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto	13. VI.	Sofio	CE de BEA
25.	Ekskurso-feriado laŭ Danubo kaj la Nigra Maro	18—28. VI.	Danubo Nigra Maro	Sekcio de Esperantistoj-Turistoj kaj E-societo „Espero“ — Gorna Orjajovica
26.	Mara Amika Renkontiĝo (MARE)	20—21. VI.	Varna	E-societo „Albatroso“
27.	Renkontiĝo-seminario de filologoj-esperantistoj	23—26. VI.	Varna	Sekcio de Filologoj-Esperantistoj
28.	110 jaroj de la naskiĝo de Vasil Kolarov	27. VI.	Ŝumen	DE de BEA — Ŝumen
29.	Distrikta junulara esperantista brigado kaj celebrado de la 150-jara datreveno de naskiĝo de Vasil Levski	1—20. VII.	Karlovo	DE de BEA — Plovdiv
30.	Tradiciaj E-kursoj (I—III gradoj kaj por instruarajtoj)	1—20.VII.	Pisanica	Internacia E-Kursejo (IEK)
31.	Ŝakfestivalo de esperantistoj-pachatalantoj (kun internacia partopreno)	10—19.VII.	Târgoviște	E-societo „Verda Eskadrono“ — Târgoviște
32.	V Internacia Somera E-Universitato	11—17.VII.	Veliko Târnovo	DE de BEA — Veliko Târnovo
33.	Internacia junulara esperantista brigado	7—27.VIII.	vilaĝo Sădievo	DE de BEA — Burgas
34.	Tradiciaj someraj E-kursoj (I—III gradoj kaj por instruarajtoj)	10—30.VIII.	Pisanica	Internacia E-kursejo (IEK)
35.	Internacia Danuba Remado — IDR'87	17—31.VIII.	Rivero Danubo	Sekcio de Turistoj-Esperantistoj
36.	Turista E-renkontiĝo	22—23.VIII.	Târgoviște, montodomo „Lisec“	E-societo „Verda Eskadrono“ — Târgoviște
37.	Kvalifika kurso por E-instruistoj	2—6.IX.	Pisanica	Instrukomisiono ĉe CE de BEA
38.	Turistaj tagoj de montodomo „Esperanto“	17—20.IX.	Sofio	UE de BEA kaj Sekcio de Turistoj-Esperantistoj
39.	Seminario-ripozo „Tra valoj kaj arbaroj“ (kun internacia partopreno)	18—28.IX.	Velingrad	E-societo „Stoju Kalpazanov“

N-ro	ARANĜO	DATO	LOKO	ORGANIZANTO
40.	Celebrado de la 40-jariĝo de E-societo „G. Dimitrov“	19—20.IX.	Dimitrovgrad	DE de BEA — Haskovo
41.	Renkontiĝo-konkurso por plenumo de E-kantoj kaj recitado de E-versaĵoj	19—20.IX.	Plovdiv	Sekcio de Blindaj Esperantistoj
42.	Konferenco de esperantistoj-fervojistoj	19—20.IX.	Varna	Sekcio de Esperantistoj-Fervojistoj]
43.	Scienc-teknika konferenco de esperantistoj-poŝtistoj	25—27.IX.	Blagoevgrad	Sekcio de Esperantistoj-Poŝtistoj
44.	Turista renkontiĝo „Karandila '87“	25—27.IX.	Sliven	DE de BEA — Sliven
45.	Nacia Oratora Konkurso „100 jarojn Esperanto kaj 70 jarojn de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio“	25—27.IX.	Pisanica	IEK, Sekcio de Artistoj-Esperantistoj
46.	Tradicia internacia seminario de junaj esperantistoj — „La esperantista junularo por paca Eŭropo“	28.IX.—4.X.	Pisanica	Bulgara Esperantista Junularo (BEJ) ĉe CE de BEA kaj TEJO
47.	Renkontiĝo de profesiaj instruistoj-lingvistoj	2—5.X.	Pisanica	Sekcio de Filologoj-Esperantistoj
48.	Internacia Seminario de Lingvistoj-Esperantistoj	5.—9.X.	Pisanica	Sekcio de Filologoj-Esperantistoj
49.	Frukta Vespero	10—11.X.	Kjustendil	DE de BEA — Kjustendil
50.	100 jarojn Esperanto kaj 100 jarojn de la naskiĝo de Dímêo Debeljanov	10—11.X.	Koprivŝtica	DE de BEA — Sofio
51.	Tradicia kvizo — nacia etapo	10—11.X.	Razgrad	DE de BEA — Razgrad
52.	Kaŝtana vespero	10—11.X.	Petriĉ	E-societo „Esperanto Triumfonta“
53.	Konferenco „Esperanto en profesioj“	16—20.X.	Vraca	DE de BEA — Vraca
54.	Konkurso-recitalo lige kun la 70-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio	16—20.X.	Vraca	DE de BEA — Vraca
55.	Il scienca seminario „Kosmaj esploroj“	18.X.	Vraca	DE de BEA — Vraca
56.	Recitalo „70 jarojn de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio	30.X.—1.XI.	Jambol	DE de BEA — Jambol
57.	Renkontiĝo kun reprezentantoj de la ĝemelurboj kaj konkurso-recitalo de traduka poezio — verkoj de la poeto Cvetan Spasov kaj versaĵoj pri la rusa-bulgara batalmikeco	16—19.XI.	Pleven	DE de BEA — Pleven
58.	80 jarojn E-societo „Nova Mondo“	14—15.XI.	Svilengrad	DE de BEA — Haskovo
59.	Dobruĝana Amika Renkontiĝo Esperantista (DARE)	14—15.XI.	Silistra	DE de BEA — Silistra
60.	Nacia studenta renkontiĝo	6—8.XII.	Pisanica	Junulara Sekcio
61.	Novjara E-festo	28.XII. 87—2.I.88	Pisanica	Internacia E-kursejo

La Instrukomisiono ĉe CE de BEA en sia kunsido okazinta la 11.11.86, aprobis la proponojn pri titolo de instruistoj:

ELSTARA LEKTORO

Dimităr Canev el Popovo
Petko Arnaudov el Pazarĝik

REKONITA LEKTORO

Maria Rajčeva el Târgoviște
Libertaria Mladenova el Sofio
Veneta Baleva el Sofio
Mariana Elenova el Sofio
Bistra Dojčinova el Sofio

PORPACA FORESTA MITINGO

Lernejana E-klubo „Stelo de l'Espero“ (USSR) planas, kune kun la Klubo de Internacia Amikeco, kies sekcio ni estas, aranĝi aprile 1987 internacian forestan porpacan mitingon. Ni petas diversajn pacbatalantojn el ĉiuj landoj sendi al ni leterojn, afiŝojn, broŝurojn, BK kaj aliajn materialojn por ekspozicio aŭ laŭlegado dum la mitingo. Reciproke ni povas sendi dorpacajn broŝurojn en Esperanto kaj en la angla, ankau BK pri Sovetunio.

Temoj por leteroj:

— mia rilato al la „strategia defenda iniciato“ de Reagan;

— mia rilato al la Deklaro de Gorbačov (1986. 01. 15)

— infanoj kaj paco (ĉu la interligo pasiva aŭ aktiva?);

— kion mi persone volas kaj povas fari por la paco? Bonvolu tuŝi laŭdezire unu, kelkajn aŭ ĉiujn temojn. Limdato por sendo al ni — fino de marto 1987.

Nia adreso: USSR 454 000 Ĉeljabinsk, Alojje pole, Dvorec Pionerov, Esperanto.

„SCIENCA MONDO“ PLU ABONEBLA

La Esperanta eldono de revuo „Scienca Mondo“, organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, estas plu abonebla ĝis la fino de la kuranta 1986 kaj dum la tuta 1987. Bonvolu turni vin al la administracio de la revuo — Sofio 1504, str. Oborište 35.

Abonkotoj: por Bulgario — 1,50 levoj, por eksterlando — 7,50 svisaj frankoj aŭ 3 rubloj.

NE PROKRASTU ABONI REVUON „SCIENCA MONDO“, KIU HAVIGAS AL VI INTERESAJN NOVAJOJN PRI LA MONDA SCIENCIO!

„JUNA AMIKO“ APEROS KVARFOJE

Ekde januaro 1987 la hungara revuo „Juna Amiko“ aperos kvarfoje jare anstataŭ la ĝisnunaj tri numeroj. La abonantoj el socialismaj landoj povas ricevi ilin dum la jubilea jaro kontraŭ neŝanĝita abonprezo.

László SZILVÁSI

- II Soci-politika aspekto de Bulgara Esperanto Movado (Canko Murgin)
- 1 La jubilea jaro (Hristo Gorov)
- 3 Solena celebrado (Ekaterina Stajkova)
- 4 Plenkunsido pri propagando de Esperanto (Radi Bančevski)
- 5 Niaj veteranoj: Sencoplena vivo (Bojana Prodanova); Sindona aktivulo (Todor P. Todorov)
- 6 Juna Esperantisto: La homa spirito venkos (Maria Jankova); „Esperanto en mia vivo“ (Lilia Nikolova)
- 7 Jubilea dokumenta filmo (Dončo Hitrov)
- 8 Unika libro pri kinoarto (Gerhardt Wohl)
- 8 Raporto el Eŭropa Esperantujo (Yoshiaki Mizuno)
- 11 Poezio
- 12 Kelkaj konsideroj pri frazeologiaj esprimoj kaj Esperanto (Leonid Mjasnikov)
- 12 Enlanda movado
- 14 Naciaj, internaciaj kaj regionaj aranĝoj de BEA dum 1987
- IV Distroj

Sur la unua kovrilpaĝo:
Vintra paradizo

NOVA SOCIETO

En urbo Kozloduj estis fondita E-societo, kiu portas la nomon de nia granda poeto kaj revoluciulo Hristo Botev.

La societanoj estas diversaj kaj diversprofesiaj, sed ĉiuj deziras ellerni la Internacian Lingvon. Ili serioze okupiĝas pri Esperanto en kurso gvidata de Conju Minkov kaj ĉiuj estigis abonantoj de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“.

Conju MINKOV

NI FUNEBRAS

Ne estas jam inter ni la sindona multjara kaj fervora E-aganto Dimităr Ivanov Sertov el Vraca, forpasinta la 15-an de novembro 1986. La esperantistaro de Vraca-distrikto estimis lin pro liaj modesteco kaj homeco, pro liaj grandaj meritoj por prospero de la E-movado en nia distrikto. Ni kliniĝas antaŭ la hela memoro de nia eksprezidanto kaj promesas labori sindone kiel li por la triumfo de Esperanto, de la tutmonda paco.

DE de BEA — Vraca

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENova, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distro

LA MALSANA SAKLUDANTO

La eminenta kuracisto de infanaj malsanoj N. Filatov estis konata kiel bonega ŝakludanto. Foje li vizitis malsanigintan knabon. Post kiam la kuracisto esploris sian malgrandan pacienton kaj preskribis kuracilojn, li rimarkis apud la lito ŝaktabulon kun ordigitaj figuroj.

— Ĉu vi ludas ŝakon? — demandis Filatov.
— Jes, iomete — respondis la knabo.
— Ĉu vi volas ludi kun mi unu partion? — proponis la kuracisto, por iom distri la malsanan knabon.
Ili komencis kaj post nelonge Filatov matis.
— Tio ne eblas! — li diris konsternite. — Ni ludu ankoraŭfoje!

La duan partion li denove malgajnis.
Kaj ĉiam, kiam li venis ĉe la malgranda paciento, Filatov ludis ŝakon kaj regule malgajnis. La knabo, kiun la kuracisto-ŝakludanto neniam sukcesis matigi, nomigis Aleksandro Aljehin — unu el la plej grandaj ŝakistoj de nia tempo, dufoje monda ĉampiono.

Aforismoj

● La homo ne estas malplena botelo, en kiun oni povas enversi kian ajn likvaĵon.

D. I. Pisco

● Kiel belega estas la homo, kiam li estas vera homo!

Menandro

● Kiu ne estis infano, tiu ne iĝos plenkreskulo.

Charly Chaplin

● Kia vi estas antaŭtagmeze, tia vi estos ankau posttagmeze.

Louis XIV

● En ĉiu aĝo de la vivo la homo similas novulon.

Chamfort

● Ĉiu pereinto por iu ideo ne pereis vane.

P. Togliatti


● La ideoj estas malofta ĉasbesto en la vortar-arbaro

V. Hugo.

● Oni povas ĉion travivi, krom sian propran morton.

E. Krothi

PLI BONE MALFRUE OL NENIAM



Mi rediras al vi: viskio kaj televido estas vintraj okupoj. Nun revenis la printempo — estas jam tempo por finfine elpaki viajn novjarajn donacojn!

Anekdotoj

Paciento: — Mi ege timas! Ja tio estas mia unua operacio!

La medicina fratino: — Estu trankvila! Tio estas la unua operacio ankau de la hirurgo!

— Do vi estas kandidato por la posteno de nokta gardisto. Kiajn kvalitojn vi havas?

— Mi vekigas ĉe plej malforta bruoj...

Studentino demandas tamen fizikiston:

— Pri kio vi okupiĝas?

— Pri fizikaj studoj!

— Ĉu ĉiam ankoraŭ? Mi finis per tio jam antaŭ du jaroj...

Ĉefo (al sia sekretario): — Kiel vi aperas antaŭ mi nerazita

— Mi lasas kreski mian barbon!

— Tio estas via afero! Sed bonvolu fari tion hejme, ekster la laborhoroj!

Movoj de la Kavaliro

Komencante per la silabo KI (nigreta) kaj laŭ la kavaliro movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon!

PER	NI	KI	NI	RAS
RAS;	ON	DIS,	NE	AM
POR	GIN	LO	FLO	HA
KI,	NI	VAS,	NI	VA

ANGULENIGMO

(En ambaŭ direktoj:)

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
A								
B								
C								
Ĉ								
D								
E								
F								
G								

A — Vaksosimila substanco B — Amata virino C — Montara profunda valetio Ĉ — Reĝo de la hunoj D — Malkomenco E — Femalo F — Anglalingve: „Ne“. G — Mallongigo por „organizaĵo“.